




EL *Popola*
ĈINIO

N-ro 3

MARTO 1967



La Ekspozicia Salono en Šaušan — iama loĝejo de kamarado Maŭ Zedong.



Intime Parolas Prezidanto Maŭ kun k-do N. Bethune. (olepentraĵo)

Rememore al Norman Bethune

MAŬ ZEDONG

(La 21-an de decembro 1939)

KAMARADO Bethune estis membro de la Komunista Partio de Kanado. Kiel sendito de la Komunistaj Partioj de Kanado kaj Usono, li ne trovis la vojaĝon longa por veni al Ĉinio fore de dekmiloj da mejloj en la aĝo de pli ol 50 jaroj, kun la celo helpi Ĉinion en ĝia Kontraŭjapana Rezistmilito. Li atingis Jan-an en la printempo de la lasta jaro, poste laboris en la montaro Vutaj kaj tie bedaŭrinde oferis la vivon sur sia posteno. Estante fremdulo, li rigardis kiel sian propran la liberigan aferon de la ĉina popolo, sen ajna egoisma motivo. Kia spirito tio estas? Tio estas la spirito de internaciismo kaj komunismo, ĉiu membro de la Komunista Partio de Ĉinio devas lerni de li tiun spiriton. Laŭ leninismo la proletaro de kapitalismaj landoj devas subteni la liberigajn batalojn de la popoloj de koloniaj kaj duonkoloniaj landoj, kaj la proletaro de la lastaj devas subteni la liberigajn batalojn de la proletaro de la antaŭaj, nur tiel la mondrevolucio povos venki. K-do Bethune praktikis tiun leninisman linion. Ankaŭ ni ĉinaj komparti-

anoj devas praktiki tiun linion. Ni devas unuiĝi kun la proletaro de ĉiuj kapitalismaj landoj, kun tiu de Japanio, Britio, Usono, Germanio, Italio kaj ĉiuj aliaj kapitalismaj landoj por povi faligi imperiismon, liberigi nian nacion kaj nian popolon kaj liberigi la naciojn kaj popolojn de la tuta mondo. Tio estas nia internaciismo, per kiu ni oponas kontraŭ la malvastaj naciismo kaj patriotismo.


La spirito de k-do Bethune, lia kompleta sindono al aliaj sen ajna konsidero pri si mem, elmontriĝis en lia ekstreme respondecema sento al la laboro kaj lia ekstreme varma koro al kamaradoj kaj la popolo. Ĉiu kompartiano devas lin imiti. Ne mankas homoj, kiuj ne konscias sian devon al la laboro, preferante la malpezan kaj evitante la malfacilan, ŝargante aliajn per pezaj taskoj kaj elektante por si la facilajn. Antaŭ ĉiu afero, ili unue kalkulas por si mem kaj poste por la aliaj. Farinte ion, ili eksentas ke ili havas grandan meriton, kaj ŝatas sinlaŭdi, timante ke aliaj ne scias. Kaj al kamaradoj kaj la popolo, anstataŭ esti plenkore varmaj, ili estas malvarmokoraj,

indiferentaj kaj sensentaj. Tiaj homoj en efektiveco ne estas komunistoj aŭ almenaŭ ne estas kalkuleblaj kiel puraj komunistoj. Kiu revenis de la fronto, neniu ne montris sian admiron kaj ne estis tuŝita de lia spirito, parolante pri Bethune. La armeanoj kaj popolanoj de la Limregiono de Ŝanĥi, Ĉahar kaj Hebej, kiuj persone estis kuracitaj de d-ro Bethune aŭ propraokule vidis lian laboron, ĉiuj estis kortuŝitaj. Ĉiu kompartiano devas nepre lerni de k-do Bethune lian spiriton de vera komunisto.

K-do Bethune estis kuracisto, kuracado estis lia kariero, kaj li strebadis ĉiam al pli alta nivelo en sia kuracarto. En la tuta medicina fako de la Okavoja Armeo, lia kuracarto estis elstara. Tio estas ankaŭ ekstreme bona instruo al tiuj, kiuj emas

ŝanĝi sian laboron favore por io nova, kaj al tiuj, kiuj malestimas teknikajn laborojn, konsiderante ke tiuj estas sensignifaj kaj ne donas bonan perspektivon.

Mi vidis k-don Bethune nur unu fojon. Poste li sendis al mi multajn leterojn, sed pro okupateco mi sukcesis sendi al li nur unu respondon kaj eĉ ne estas certa, ĉu li ricevis ĝin. Por mi estas tre dolora lia forpaso. Nun ni ĉiuj rememoras lin, tio montras, kiel profunde lia spirito tuŝis nian koron. Ni devas lerni lian spiriton de absoluta foresto de egoismo. El tiu punkto oni povos fari sin homo tre utila al la popolo. Ĉiu homo havas malegalan kapablon, sed sole kun tiu spirito, li jam estas homo nobla, pura, bonvirta, libera de malaltaj interesoj kaj utila al la popolo.



Bethune-Hospitalo de Internacia Paco en Ŝigiaĝuang, Hebej-provinco.

Norman

Bethune

NORMAN Bethune estis membro de la Komunista Partio de Kanado. Li estis fama kuracisto, kiu faris grandan kontribuon praktike kaj teorie en kuracado de ftizo kaj estis ankaŭ unu el la eminentaj Brust-ĥirurgoj en la mondo. Sed li ne estis kontenta pri siaj atingoj. Por serĉi la veron kaj trovi revolucion vojon, li decideme dediĉis sian tutan forton al la revolucia afero de la monda proletaro. Li aliĝis al la Komunista Partio de Kanado kaj fariĝis elstara komunisma batalanto.

En 1936, kiam germanaj kaj italaj faŝismaj banditoj invadis Hispanion, kamarado Bethune riskis sian vivon por gvidi la Kanadan Medicinan Trupon al Hispanio kaj aktive servi tie al la hispana popolo, kiu heroe rezistis kontraŭ la faŝistoj.

En 1937, eksplodis la Kontraŭjapana Rezistmilito en Ĉinio. Kiel sendito de la Komunistaj Partioj de Kanado kaj Usono, kamarado

Bethune venkis diversajn malfacilojn kaj entreprenis longan vojaĝon trans maroj gvidante medicinan trupon al Ĉinio por helpi ĝian revolucion. En aprilo de la jaro 1938, kamarado Bethune atingis Jan-an kaj, nelonge poste, jam urĝeme transpasis la Flavan Riveron por labori en la fronto. En meza tagdeko de junio li alvenis al la Limregiono de Ŝanĥi, Ĉahar kaj Hebej situanta en la postfronto de la malamiko. Tie li laboris kiel higiena konsilisto de la Milita Regiono de Ŝanĥi, Ĉahar kaj Hebej. En la komenco de lia laboro en la nomita Milita Regiono, krom kuraci vunditojn, li sin okupis ankaŭ pri establo de modela hospitalo, por doni ekzemplon al la hospitaloj de la Limregiono kaj eduki funkciulojn. Poste li establis Specialan Ĥirurgian Hospitalon, kiu akcelis siatempe pluan disvolviĝon de la kampa ĥirurgio de la Limregiono. En septembro de la jaro 1938, japanaj banditoj komencis “balaan manovron”, kaj nelonge poste kamarado Bethune forlasis la militregionan hospitalon kaj partoprenis la medicinan laboron sur bataalkampo en la fronto.

Sen ajna egoisma motivo, kamarado Bethune rigardis la liberigan aferon de la ĉina popolo kiel sian propran. Lia internaciisma kaj komunisma spirito fariĝis bona ekzemplo por ĉiuj niaj kamaradoj. Kamarado Bethune havis ekstreme respondecan senton al la laboro kaj ekstreme varman koron por la kamaradoj kaj la popolo. Li ĉiam strebadis al pli alta nivelo de sia kuracarto. La armeanoj kaj popolanoj de la Limregiono de Ŝanĥi, Ĉahar kaj Hebej, kiuj persone estis kuracitaj de li aŭ propraokule vidis lian laboron, ĉiuj estis tre emociitaj.

En oktobro de 1939, la malamikoj komencis “balaan manovron” al nia liberigita regiono. Dum operacio al vundito, li infektiĝis je fingro kaj la malsano rapide kriziĝis. Ĉiuj urĝaj rimedoj por savi lin montriĝis vanaj. Je la 12-a de decembro 1939 kamarado Bethune mortis en sia 50-a jaro (1890 — 1939).

Kvankam kamarado Bethune nin forlasis, tamen lia nobla internaciisma kaj komunisma spirito vivas ĉiam en la koro de la ĉina kaj monda popoloj.

Vortoj de Kamarado Norman Bethune — Komunisma Batalanto

☆ Sagaca, vere sagaca! Kamarado Maŭ Zedong estas efektive granda direktilisto. Kiom feliĉa estas la ĉina popolo havanta tian gvidanton!

☆ La amaso estas nia sangprovizejo, tia kondiĉo estas simple senprecedencaĵo en la historio de ĥirurgio. En Hispanio, ni ne pensis pri tio ĉi. Prezidanto Maŭ diris, ke oni mobilizu la amason kaj apogu sin sur la amaso, kaj ĉia malfacilo povas esti venkita. Kia granda penso tio estas!

☆ Por fari revolucion, oni ne povas zorgi unue pri sia persona sekureco. Milito kontraŭ faŝistoj ne estas sekura afero. Por persona sekureco mi ne estus veninta al Ĉinio. Nur per forigo de faŝismo ekestos por ni fidinda sekureco. Komunistoj ne devas konsideri, antaŭ ĉio, sian personan sekurecon.

☆ Revolucia frateco ne konas limon inter Ĉinio kaj eksterlando.

☆ Vi kaj ni ĉiuj estas internaciistoj. Neniu limlinio de raso, haŭtokoloro, lingvo kaj regno povas dividi nin. La faŝistoj nun minacas la mondpacon, ni devas venki ilin.

☆ Mi venis al Ĉinio, ne nur por vi, sed ankaŭ por ni. Ni diru al vi: ni batalos ŝultro ĉe ŝultro, kun ĉinaj kamaradoj, ĝis venko de la rezista milito. Ni ne forlasos vin, antaŭ ol la japanaj faŝistoj estos forpelitaj el Ĉinio. Hodiaŭ ni vin subtenas; kiam vi venkos estonte, vi same nin subtenos.

☆ Mi venis ja por subteni la naciliberigan militon de Ĉinio, pro kio mi bezonas monon?

Se mi volus vesti kaj nutri min bone, mi restus en Kanado kaj ne venus al Ĉinio.

☆ Komandantoj kaj batalantoj heroe batalas kontraŭ la malamikoj sur la fronto, timante nek sangoverŝon, nek vivoferon. Ni laboras postfronte, kio gravas, se ni maldormas tri aŭ kvin noktojn? . . . La plej granda plezuro por ni medicinaj laborantoj estas savi pli da vunditoj aŭ malsanuloj kaj redukti al ili pli da suferoj.

☆ Kio estas la devo de kuracisto, flegisto aŭ sanitaristo? Lia devo estas ĝojigi la pacientojn, kaj helpi ilin reakiri sanon kaj forton. Vi devas rigardi ĉiun pacieron kiel vian fraton, vian patron. Ĉar, verdire, ili estas eĉ pli intimaj ol fratoj aŭ patroj — ili estas ja viaj kamaradoj. En ĉiuj aferoj ni devas meti ilin en la unuan lokon. Se vi ne rigardas ilin pli gravaj ol vi mem, do vi ne estas taŭga por labori en la afero de sanigado, nek por labori en la Okavoja Armeo.


☆ Jam forpasis la epoko, en kiu revolucia kuracisto sidis hejme kaj atendis la alvenon de malsanuloj. De nun nia bataloslogano estas: Al la fronto, al la vunditoj. Ni iros tien, kie estas vunditoj!

☆ Vi ne traktu min kiel antikvan kuriozaĵon. Mi venas por labori, vi devas uzi min kiel bonegan maŝinpafilon.

☆ En Ĉinio vi havas proverbon, kiu diras bone: Vivi ĝis kaj lerni ĝis maljuneco!

☆ Cento da malplenaj frazoj ne valoras eĉ solan aferon faritan per la propraj manoj.

Rakontoj pri Norman Bethune



Norman Bethune

NENIAM ZORGI PRI SIA PROPRA SEKURECO

En profunda nokto de la 28-a de novembro 1938, la hospitalo, kie k-do Bethune laboris, ricevis leteron de estro de armeo ĉe la fronto, postulantan ke ili sendu medicinan trupon al la fronto en la sekvinta tago. La hospitalo situis pli ol 50 kilometrojn for de la fronto. Eksciante ke tuj komenciĝos batalo, k-do Bethune ekiris senhezite en la nokto. Gvidante la medicinan trupon kaj kondukante alian ŝarĝbruton portantan medikamentojn li rajdis sur ĉevalo trans montoj spite al neĝblovado kaj atingis montvalon apud la fronta pozicio en la tagmezo de la sekvinta tago. La operaciejo estis aranĝita en malgranda templo en la montvalo.

Tiam ekstreme intense iris la batalo sur la fronto. Tondre bruadis eksplodo de mangrenadoj kaj pafado de mitraloj. Ne longe post la 1-a horo posttagmeze alvenis vunditoj aro post aro kaj li estis okupata de tre intensa operaciado. Oni foje-foje konsilis lin ripozi, sed li diris: "Pli gravas la vivo de la vunditoj. Ja ne gravas ke mi ripozu iom malpli multe." La operaciado daŭris ĝis la antaŭtagmezo de la sekvinta tago. Subite aŭdiĝis eksplodo de bomboj. Kvar malamikaj aviadiloj ĉirkaŭflugis en la aero kaj ĵetis bombojn. La tendo super la operacia stablo estis tremskuata de la aerofluo. Oni proponis ke li bone sin kaŝu aliloke, sed li diris decideme: "Ĉu la armeanoj povus ĉesigi sian batalon pro aera atako? La operacia stablo ja estas nia batala posteno kaj ni nepre devas persisti ĉe ĝi."

KAMARADO Norman Bethune estas granda internaciisma batalanto. Lia vivo estas vivo de batalo por revolucio, estas vivo plena de komunisma spirito. Lia brila nomo estas gravurita por eterne en ĉies koro.

La malamikaj aeroplanoj ĉirkaŭflugadis kaj bombadis freneze. Subite, bum! Bombo falis 40 metrojn malantaŭ la templo kaj ĝia posta muro ruiniĝis.

Oni refoje konsilis kamaradon Bethune foriri por garantii sian sekurecon. Li firme rifuzis.

ĈIAM TENI EN SIA KOROLAJ VUNDITOJN KAJ MALSANULOJN

K-do Bethune ĉiam zorgis pri la vunditoj kaj malsanuloj. Se li aŭdis ke la vunditoj kaj malsanuloj bezonas helpon, li tuj iris en la malsanulan ĉambron ofte eĉ sen scio de sia interpretisto. Se li vidis, ke la pacientoj estas gaje babilantaj kun rideksplodo, li tre ĝojiĝis kaj tiam li intime frapetis al iu la ŝultron aŭ premis al alia la manon. Se li vidis ke iu paciento ĉagreniĝis, li do sidiĝis ĉe li kaj lin demandis, ĉu li havas malfacilon, ĉu la vundo doloras lin kaj ĉu la malsanulejo ne plaĉas al li.

Foje, iu grave vundita paciento volis urini kaj vokis flegistinon. Aŭdinte tion k-do Bethune miskomprenis, ke li volas feki, tial li tuj prenis fekaĵujon kaj eniris en la malsanulan ĉambron kaj donis ĝin al la paciento. Sed la paciento nur skuis sian manon. Iom pensinte, k-do Bethune elkuris kaj baldaŭ revenis kun urinujo en la mano. Rapide la paciento ĝin transprenis kun kortuŝiĝo, dum k-do Bethune ridis pro ĝojo starante apude.

Iu grave vundita paciento tute perdis sian apetiton. Informiĝinte pri tio, k-do Bethune rapidis al la kuirejo kaj longe mimikis antaŭ kuiristoj, sed neniu el la kuiristoj povis lin kompreni. Li do tuŝetis kaserolon per sia mano, ekprenis ovon, faris gestojn de ovofrakaso kaj akvoĉerpo kaj etendis sian brakon por preni olebotelon. La maljuna kaporalo de la kuirsubplotono konfuziĝis. Li hastis al la interpretisto kaj diris: “D-ro Bethune venis al la kuirejo kaj faris al ni mimikon. Ni ne povas ĝin kompreni. Tuj iru helpi!” La interpretisto kuris en la kuirejon kaj solvis la enigmon: k-do Bethune volis ke oni preparu bovlon da ovosupo por la paciento. Faldinte supren siajn manikojn, la maljuna kaporalo diris: “Estu trankvila, d-ro Bethune. Ni certe kontentigos la pacienton.” K-do Bethune tre ĝojis kaj manpremis kun la maljuna kaporalo. Li restis en la kuirejo ĝis la lasta finpreparis ovosupon, kaj li foriris kontente ĝis kiam flegistino portis la supon al la paciento.



En la jaro 1939, Doktoro Bethune faras operacion por vundito en provizora operaciejo en la Limregiono de Ŝanhi, Ĉahar kaj Hebej.

TRANSFUZI SIAN SANGON AL VUNDITO

Foje, oni devas fari amputon al iu vundito. Sed evidente estis tre malfacile por tiu ĉi elteni ĝin, ĉar li jam tro multe sangis kaj la temperaturo de lia korpo estis tre alta. “Transfuzu sangon al li!” diris k-do Bethune.

Tiam estis malfacile gajni medicinan sangon por transfuzado. Multaj el la laborantoj de la malsanulejo jam transfuzis sian sangon al vunditoj. Kaj nun la vivo de la vundito troviĝis en tre dan-



Doktoro Bethune en la operaciejo de la Modela Hospitalo de la Limregiono de Ŝanhi, Ĉahar kaj Hebej.

ĝera stato, oni ne devis prokrasti la operacion. K-do Bethune firme postulis savi sian klasfraton per sia propra sango sed ĉiuj ne konsentis pri tio, pensante ke li estas maljuna kaj malforta. Li diris: “Ne perdu tempon. Mia sango estas O-tipa, taŭgas por ĉiuj. Por sia patrolando kaj nacio, la komandantoj kaj batalantoj sur la fronto povas verŝi sian sangon kaj oferi siajn vivojn. Kio gravas se ni, laborantoj en la postfronto, kontribuas iometon el sango? Por savi la vunditon, ne perdu tempon!” Tion dirinte li kuŝiĝis sur alia operacia stablo, malbutonis sian veston kaj elmanikis sian brakon. La sango de Norman Bethune, eminenta filo de la kanada popolo, fluis malrapide tra la injektilo en la sangtubon de la batalanto de la ĉina popolo. La sango de la internaciisma batalanto havigis al tiu armeano la duan vivon.

LA KRURO POVAS ESTI NE AMPUTITA

Armeano Zeng Hidoŭ grave vundiĝis en la batalo ĉe Lajjuan kaj estis sendita al la sanatorio en Hiaguan-vilaĝo de Janbej por ricevi kuracadon.

Vidante ke lia krur-osto jam rompiĝis kelkaj kuracistoj proponis ĝin amputi opiniante, ke nur tiel oni povas sekurigi la vivon de la vundito. Ĝuste tiam Bethune venis tien dum sia rondira kuracado. Tiu informo vekis lian atenton. Li persone observis la kruron de la vundito kaj trovis, ke kvankam la krur-osto jam rompiĝis, tamen la nervoj de la kruro ankoraŭ ne estis detruitaj, kaj ĝi povas esti savita per zorgema kuracado. Tiam iu kuracisto demandis lin ĉu estas bezonata tuj fari la amputon. Li diris firmdecide: “Ĝi ne devas esti amputita. Konservu ĝin. Ni ĉiuj kuracistoj devas kompreni, ke resanigo de unu vundito signifas ekstermon de dek malamikoj.” Tiuj vortoj tuŝis la koron de ĉiuj kuracistoj.

Por konservi la kruron de la vundito, k-do Bethune faris al li diagnozon kaj kuracadon kune kun aliaj kuracistoj kaj flegis lin tagnocte por observi lian sanstaton. Iom post iom k-do Bethune malgrasiĝis pro peniga laboro kaj manko de dormo dum longa tempo, sed li neniam zorgis pri si mem. Post pli ol unu monato, la brava batalanto Zeng Hidoŭ revenis al sia batala posteno.

“TIO ESTAS PLEJ ĜOJIGA AFERO!”

Oktobre de 1939, la japanaj rabistoj lanĉis grandskalan “vintran forbalaadon” al la montregiono en la okcidenta parto de Hebej-provinco. K-do Bethune gvidis la medicinan trupon alveni al Sungiaĝuang-vilaĝo de Lajjuan-gubernio. Tie ili renkontis vunditojn venintajn de la fronto ĉe la monto Motianling. Preterlasinte la manĝon li eklaboris intense ĉe la operacia stablo.

Posttagmeze de la dua tago de la batalo, subite gardstaranto kuris en la operacian ĉambron kaj raportis, ke malamikoj troviĝas norde sur la montoj. “La malamikoj atakos nin de nia dorsa flanko!” li diris, “ne malproksime jam!”

“Momenton! Kiom da vunditoj operaciotaj ankoraŭ troviĝas ekstere?” demandis k-do Bethune daŭrigante sian laboron.

“Dek. Kaj plejparto el ili estas grave vundita.”

“Tuj sendu aliloken la vunditojn operaciitajn, kaj tuj aldonu ĉi tien du operaciajn stablojn, sur kiuj ni faru operaciojn samtempe por plirapidigi nian laboron kaj fini tiujn dek operaciojn en plej mallonga tempo. Ni devas esti ĉiam pretaj por ekmarŝi.”

Post kelkaj minutoj la gardstaranto refoje envenis kaj raportis, ke almenaŭ 700 japanaj armeanoj iras malsupren de sur la montoj. Absorbata de sia laboro k-do Bethune nenion diris. Subite eksonis pafado de fusiloj en la montvalo, kvazaŭ ĉe ilia apudeco.

“Bedaŭrinde!” K-do Bethune ekkriis. La kamaradoj sin turnis por lin vidi. “Ne grave,” li diris. “Mi pikvundis mian fingron.” Li petis ilin daŭrigi la laboron. Li levis sian maldekstran manon kaj trempis ĝin en la desinfektan fluidon. Momenton poste, li denove okupigis pri sia laboro.


Post 20 minutoj, restis nur unu juna paciento kun vundita kruro. Kiam li estis portita sur la operacian stablon, ree eksplodis pafbruo. Ĉifoje ili

aŭdiĝis des pli proksime. La gardstaranto haste envenis dirante: “K-do Bethune, vi ne povas resti plu ĉi tie eĉ momenton!” Tirante la brakon de k-do Bethune, iu kuracisto staranta apude diris: “Bonvolu foriri tuj! Mi vin anstataŭigos.” Ankaŭ la juna kuracoto sur la operacia stablo levis sian kapon dirante sincere: “D-ro Bethune, foriru tuj. Mi ne estas grave vundita. Kunportu min kun vi aŭ restigu min ĉi tie, sed vi mem nepre tuj foriru!”

“Bona knabo, atendu nur momenton,” diris milde k-do Bethune. “Se ni nun elspezos plu kelkajn minutojn, mi povos resanigi por vi la kruron, alie ĝi perdiĝos.”

La intensa pafado de mitraloj pli kaj pli alproksimiĝis, sed k-do Bethune daŭrigis la operacion

Vintre de 1939, N. Bethune fotita en la Limregiono de Ŝanhi, Ĉahar kaj Hebej



absorbite kaj ĝin finis. Oni forportis la pacien-ton per blankardo, kaj k-do Bethune sekvis ilin sur ĉevalo. Apenaŭ ili eniris en la montvalon, kiam la malamikoj jam sin trudis en la vilaĝon. Post tiu aventuro oni diris al k-do Bethune, ke tiam li estis vere en danĝero. Sed li ĝoje diris kun rido: "Hodiaŭ ni akiris grandan venkon kaj plenumis nian taskon. La batalantoj de la Okavoja Armeo ne timas eĉ hajlon de kugloj nek arbaron de pafiloj. Negrave vundite, ili ankoraŭ persistas en batalo ne volante forlasi la fronton. Mi estas higiena konsilanto de la Okavoja Armeo, tial mi devas sekvi la ekzemplojn de la batalantoj. Estas plej ĝojinde, ke mi povis fini la operaciojn por la bravaj komandantoj kaj batalantoj."

LI ĈIAM VIVOS EN ĈIES KORO

La 1-an de novembro 1939, la fingro de k-do Bethune infektite veneniĝis post vundiĝo, kiam li faris operacion por malsanulo kun ĥirurgia infekta malsano. Lia fingro ŝveliĝis kaj tre doloris lin. Sed, spite al sia malsano li konkure montris sian volon iri al la fronto. Oni konsilis lin ripozi kelkajn tagojn, sed li ne konsentis decideme.

Efikis nenies konsilo. Ekmarŝis denove la medicina trupo. K-do Bethune rajdis ŝanceliĝante sur la ĉevalo. Survoje li renkontis kelkajn vundi-tojn portitajn de sur la fronto. Vidante ilin li sin riproĉis senĉese kun bedaŭro: "Mi malfruiĝis! Malfruiĝis!" Kiam li atingis la sidejon de la higiena trupo de iu regimento en Vanggiataj, lia fingro ŝveliĝis pli terure kaj la temperaturo de lia korpo plialtiĝis. Preninte iom da medikamento li denove sin levis obstine kaj petis sian interpretiston irigi komunikiston por sciigi ĉiujn trupojn, ke ili sendu ĉiujn siajn vunditojn al lia medicina trupo. Krome li aldonis, ke oni nepre portu la kuracotojn vunditajn je la kapo, brusto aŭ ventro al li mem, ke li persone ekzameni ilin, kaj ke oni veku lin eĉ se li jam endormiĝis.

Des pli paliĝis la malgrasiĝinta vizaĝo de k-do Bethune pro longdaŭra laciĝo kaj torturo de la malsano. Liaj membroj estis malvarmaj kaj lia sanstato jam fariĝis plej malbona. La kuracistoj de la medicina trupo faris por li ĉiajn urgajn kuracojn kaj aplikis ĥirurgiajn rimedojn, sed vane. Fronte al tiu kriza stato, la kamaradoj proponis detranĉon de lia malsana brako.

"Ne plu faru por mi klopodojn, kamaradoj," diris k-do Bethune skuante sian kapon. "Mi fidas

al vi. Mi volas eĉ oferi ambaŭ miajn brakojn se nur vi povus min savi. Kamaradoj, la problemo nun koncernas jam ne nur la brakon. Mia sango veneniĝis. Septicemio. Nenia rimedo povas helpi. Mi petas ke vi eliru momenton kaj lasu min iom trankviliĝi en soleco."


Ĉiuj vilaĝanoj sciigis, ke k-do Bethune grave malsaniĝis. Ili kolektiĝis ekster la ĉirkaŭmuro de la korto kaj aŭskultis sen bruo. Tiam iu trupo estis pasanta tra la vilaĝo. Informiĝinte pri la danĝera sanstato de k-do Bethune, la armeanoj ĉiuj ne volis foriri. Ili sendis kelkajn reprezentan-tojn en la korton. La kuracisto permesis al ili nur vidi k-don Bethune tra la fenestro. La senditoj kunpremiĝis antaŭ la fenestro kaj rigardis silente. Ili ĉiuj eklarmis, kiam ili vidis la bone konatan vizaĝon de Bethune kaj lian skeletan brakon. For-irante ili diris al la kuracisto: "Ni helpos vin kuraci la malsanon de k-do Bethune per batalo, ĉar li certe ĝojos kiam li aŭdos niajn informojn pri venko."

Vesperigis. La vilaĝanoj ankoraŭ svarmis ekster la ĉirkaŭmuro, atenteme rigardis al la interpretisto kaj la kuracistoj kaj demandis de tempo al tempo pri la sanstato de k-do Bethune.


K-do Bethune pene sin levis kaj sidiĝis. En peza kaj malfacila spirado li komencis skribi tes-tamenton al komandanto Nje, en kiu li raportis siajn lasttempajn laboron kaj vivon kaj proponis ke oni tuj organizu kaj sendu operacian trupon al la fronto ĉebatalkampasavado. Li ankaŭ petis komandanton Nje transdiri jenajn vortojn al la Komunista Partio de Kanado kaj la Komunista Partio de Usono: "Mi estas tre ĝoja. Mia sola deziro estas ke mi povu fari pli multe da kontri-buoj..." Kaj fine li skribis: "La pasintaj du jaroj estas la plej ĝojigaj kaj plej signifoplenaj jaroj de mia tuta vivo... Permesu ke mi esprimu mian miloblan dankon al vi kaj al la aliaj milionoj da karaj kamaradoj." Li donis la testamenton al sia interpretisto kaj demetis la fluoreskan horloĝon de sur sia brako kaj donis ĝin al la interpretisto kiel sian lastan donacaĵon. Kvieta rideto radiis sur lia vizaĝo kaj li elkore stimulis la interpretiston kaj kuracistojn: "Penadu! Marŝu al la granda vojo kaj kreu la venontajn aferojn!"

La 2-an de novembro 1939, frumatene je 20 minutoj post la kvina, en la gubernia urbo Tanghian, Hebej-provinco, la granda internaciisma batalanto k-do Bethune oferis sian brilan vivon por la granda afero de komunismo.

Kamarado N. Bethune ne nur persone kuracis vunditojn kaj malsanulojn, sed ankaŭ senrezerve transdonas siajn spertojn al ĉinaj medicinaj laborantoj. Tiu ĉi libro pri organizado kaj teknikoj de hospitalo estas verkita de li dum siaj malmultaj liberaj horoj.



Portebla X-radia aparato por armeo, alportita de Doktoro Bethune el Kanado





Ĉinaj specialistoj plukas tefoliojn kune kun maliaj laboristoj.

Ĉinaj Specialistoj en Malio

LA ĉinaj specialistoj, senditaj de la ĉina popolo al Malio por labori tie, ripetade lernis brilajn verkojn de Prezidanto Maŭ *Rememore al Norman Bethune* kaj aliajn kaj faris firman decidon lerni de kamarado N. Bethune por fariĝi internaciismaj batalantoj. Laŭ la instruo de sia granda gvidanto Prezidanto Maŭ, ili firme tenas la brillan ekzemplon de kamarado N. Bethune ĉiam en la koro, servadis la popolon de Malio kaj ricevis ĝiajn laŭdojn.

LABORI TUTKORE KAJ TUTANIME

Por helpi la malian popolon en konstruado de memstara nacia ekonomio, la ĉinaj specialistoj dividis dolĉon kaj amaron kun la malia popolo, pene laboradis kaj sukcesis kulturi sukerkanojn kaj tearbojn en Malio nur en mallongaj 3-4 jaroj, finkonstruis fabrikojn de cigaredoj, alumetoj kaj sukero antaŭ la fiksitaj datoj. Nun ili sin okupas

en konstruado de ŝpinteksejo kaj kinejo. La diritaj atingoj estas kristalo el la ŝvito kaj sango de la laboristoj kaj teknikistoj de Malio kaj la specialistoj de Ĉinio. La malia popolo laŭdis la ĉinajn specialistojn, ke ili transportis la “antaŭensaltegon” al Malio, kaj ke ili estas ekzemploj de proleta internaciismo.

Kiam la ĉinaj specialistoj kun la tasko de konstruado de sukerpreparejo alvenis al la konstruejo en la komenco de 1965, tie estis sovaĝejo plena de diversaj herboj kaj arboj, “super la kapo sin trovis nur la blua ĉielo, kaj sub la piedoj sin etendis nur herbejo”. Ili enloĝiĝis en kabanojn kun teraj muroj kaj pajlaj tegmentoj kaj komencis la konstruan laboron. La ĉinaj specialistoj por konstruado de Segou-ŝpinteksejo transformis ne plu uzeblan laborejon en sian loĝejon formante apartajn ĉambrojn per lignaj tabuloj, kiujn ili

mem instalis kiel vandojn. Tie ne troviĝis akvo-konduka sistemo, ili do mem portis akvon per sitejoj kaj portvektio el Niger-rivero, kiu sidas fore je pli ol duona kilometro. Kaj ili mem partoprenis fizikan laboron sur la konstruejo en dimanĉoj kaj aliaj ferioj. La registaro kaj popolo de Malio estas tre zorgemaj pri la vivo de la ĉinaj specialistoj kaj foj-refoje demandis al ili, ĉu ili havas malfacilojn. Sed, la ĉinaj specialistoj ĉiam respondis: "Ni ja venis ĉi tien por servi la malian popolon sed ne por ĝuo." Multaj el la vizitintoj al la loĝejo de la ĉinaj specialistoj estas kortuŝitaj de iliaj ignoro pri vivkondiĉo, konkerado de malfaciloj per si mem kaj laŭebla malpezigo de la ŝarĝo de la malia flanko. Ili diris, ke iuj specialistoj el eŭropaj "socialismaj" landoj postulas vilaon, aŭtomobilon kaj aerfridigilon same kiel la kolonistoj, dum la ĉinaj specialistoj eklaboris diligente kun suprenturnitaj manikoj tuj post sia alveno kaj sincere helpas la malian popolon kiel veraj fratoj.

La ĉinaj specialistoj zorge kalkulas ĉiuokaze por ŝpari ĉiumaniere ĉiun ŝpareblan groŝon por la malia popolo. Kiam komenciĝis la konstruado de la ŝpinteksa fabriko, la ĉinaj specialistoj trovis post kalkulo, ke la produktaĵoj de brikfarejo estas kompare multekostaj, sekve ili mem organizis laboristojn por produkti cementajn brikojn, kaj ŝparis per tio pli ol dek milionojn da maliaj frankoj. Post finkonstruado de la cigaredfabriko, la ĉinaj ĉarpentistoj faris meminiacie skribotablojn kaj seĝojn por ekipi la oficejojn de la fabriko kaj tiamaniere ŝparis por ĝi sumon da mono pagendan por aĉeti meblojn. Maliaj popolanoj diris, ke la ĉinaj specialistoj ĉiam cerbumas por la bono de Malio kiel ĝiaj propraj anoj.

ILI ĈIUJ ESTAS ORDINARAJ LABORULOJ

Maliaj laboristoj diris: "Neniel ni povas distingi la ĉinajn specialistojn de la maliaj laboristoj kun kiuj ili laboras, krom tio, ke ilia haŭtkoloro estas malsama."

La ĉinaj specialistoj, laborantaj ĉu sur konstruejo aŭ en fabriko, konkure faras fizikajn laborojn utiligante sian libertempon. Se ili trovas iun lokon purigenda, ili tuj prenas balailon kaj ekbalaas; se ili trovas, ke mankas krudmaterialo al laborejo, ili tuj puŝas ĉaron por tion alporti. La maŝinriparistoj ankaŭ helpas la pakistojn en enkestigado, kaj la ladprilaboristoj ankaŭ helpas la stukistojn en blankigo de muroj.

Foje dum konstruado de la sukerrafinejo, oni devis labori sturme kaj kontinue dum tago kaj nokto por meti cementan bazon de la prema-

ŝino. Sur la brile prilumigita konstruejo kun bruegado de la maŝinoj, la ĉinaj laborantoj, ĉu la grupestro de specialistoj, inĝenieroj aŭ librotenisto, ĉiuj partoprenis senescepte la intensan laboron. Iuj puŝis ĉaron, aliaj okupiĝis pri batfirmigo kaj triaj faris desegnadon per ŝablontabulo. Dank' al unuanima intensa luktado dum 36 horoj fare de ĉinaj kaj maliaj laborantoj, la cementa bazo de 280 kubmetroj estis metita bone kaj rapide. Tion vidinte, maliaj laboristoj diris, ke ĉiuj ĉinaj specialistoj estas laboruloj kaj ke oni povas vidi tra ili, ke nur Ĉinio vere meritas la nomon de socialisma lando.

EKSTREME VARMKORAJ AL LA POPOLO

En septembro de 1965, foje pluvegis tutnokte en Bamako. Informiĝinte pri tio, ke la pluvego detruis la domon de malia laboristo Maligo ĉe la konstruejo sub ĉina helpo, kaj la kruro de lia edzino estis premvundita, ĉina specialisto Hju Fuliang ekmemoris la instruon de Prezidanto Maŭ

Ĉina teknikisto laboras kune kun maliaj laboristoj.



en la artikolo *Rememore al Norman Bethune* kaj decidis lerni la spiriton de N. Bethune komplete sindoni al aliaj sen ajna konsidero pri si mem kaj havi ekstreme varman koron al la popolo. Tuj post la fino de sia deĵorado kaj tute sen deziro pri ripozo, li iris al la konstruejo kun aliaj 4 ĉinaj specialistoj, trovis tie eluzitajn lignopecojn kaj betonajn tegolojn kaj riparis per ili la domon de Maligo tiel ke ĝi fariĝis kaj bela kaj fortika. Maliaj popolanoj loĝantaj en la najbareco diris kun levita dikfingro: "Bonaj estas la ĉinaj specialistoj." Kiam la ĉinaj specialistoj klarigis, ke estas Prezidanto Maŭ, kiu ilin instruis tiel agi, la maliaj popolanoj diris: "Bona estas Prezidanto Maŭ!"

Iumatene, malsekiĝis de pluvo la vestoj de malia laboristo Baragila, kiu venis deĵori ĉe la konstruejo de la ŝpinteksa fabriko. Vidinte ke li sentas malvarmon, ĉina specialisto Jan Genjan tuj elprenis siajn vestojn por ke li ŝanĝu. Baragila diris kortuŝite: "Kiel bonaj estas la ĉinaj specialistoj. Vi ne nur lernigis al ni teknikon, sed ankaŭ tiel bone nin zorgas. Neniam iu fremdulo tiel bone traktis nin kiel la ĉinaj specialistoj."

DANKEMO DE LA MALIA POPOLO AL PREZIDANTO MAŬ


Antaŭnelonge, kelkaj ĉinaj specialistoj finis sian laboron en Malio kaj estis forlasontaj Malion por reveni al sia patrolando. Kiam ili adiaŭis la maliajn amikojn, kiuj kunlaboradis kun ili,

la maliaj laboristoj kaj teknikistoj diris sincere: "Transdonu al Prezidanto Maŭ niajn varmajn salutojn kaj senliman adoron. Ni deziras, ke li, nia amata, vivu longe!"

Kiam la laboristo Abdoulaye Traore adiaŭis la ĉinajn specialistojn, li diris fervore: "Oni povas vidi en vi la laboran spiriton de la ĉina popolo sub la kulturado kaj edukado de ĝia granda gvidanto Prezidanto Maŭ Zedong. Malegoisme kaj tute senrezerve vi instruis al ni teknikojn dum laborado. En la batalo por konstruado de nia patrolando, vi, elinstruitaj de Prezidanto Maŭ, estas lernindaj ekzemploj por la malia popolo. Kvankam vi forestos, ni tamen ĉiam tenos en la koro la profundan impreson kiun vi donis al ni. La granda amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Malio ĉiam daŭros kiel la fluoj de Jangzi-rivero kaj Niger-rivero. Vivu Maŭ Zedong!"

Maŝinriparisto Sumana diris: "Dank' al nia kunlaborado kun la ĉinaj specialistoj dum unu kaj duona jaroj, ni forlasis la sensciecon kaj nun ni jam povas labori memstare. Vi traktis nin pli kore ol veraj fratoj. Ĉion ĉi tion ni ŝuldas al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la ĉina popolo, kiuj donis al ni malegoisman helpon. Same kiel la ĉina popolo, ankaŭ la malia popolo bezonas la penson de Maŭ Zedong. Prezidanto Maŭ donis al ni ideologian batalilon kaj estas la ruĝa suno, kiu brilas super la tuta tero."

Ĉina specialisto kulturis teknikistojn por la unua cigareda fabriko de Malio.



Estu Batalantoj

Kia Bethune

— Notoj pri la Kunsido de Fremdlandaj Specialistoj en Pekino pri Studo de *Rememore al Norman Bethune*

KELKCENT fremdlandaj specialistoj en Pekino el la malsamaj regionoj de Azio, Afriko, Latinameriko, Eŭropo, Ameriko kaj Aŭstralio, kiuj venis helpi la konstruadon de Ĉinio, lasttempe okazigis studkunsidon pri la brila verko de Prezidanto Maŭ *Rememore al Norman Bethune* kun senlime varma amo al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj kun senkompara adoro al la granda penso de Maŭ Zedong.

Prenante kamaradon N. Bethune kiel sian modelon kaj farante komparadon kun siaj penso kaj laboro, la specialistoj faris entuziasmajn parolojn ĉe la kunsido. Ili unuanime esprimis, ke ili bone studos la verkojn de Prezidanto Maŭ, klopodos remuldi sian mondkoncepton kaj firme decidis esti tiaj internaciismaj batalantoj kia Bethune. Jen estas notoj pri paroloj de parto el la fremdlandaj amikoj ĉe la kunsido:

SERVU AL LA MONDA REVOLUCIO EN INTERNACIISMA SPIRITO

Dannithanby Kanthaswamy (Cejlono): Antaŭ kvar jaroj mi komencis studi verkojn de marksismo

kaj de Prezidanto Maŭ. En 1965 mi studis la citaĵojn el verko de Prezidanto Maŭ: **“En la klasa socio, ĉiu vivas en certa klaso, kaj ĉiaj pensoj senescepte portas brulstampojn de klaso.”** Tiuj vortoj profunde rememorigis al mi la travivaĵojn en la pasinteco. Mi denove ekzamenis min mem. Mi pensis, ke N. Bethune senegoisme prenis la liberigan aferon de la ĉina popolo kiel la sian... Ĉu mi prenas mian laboron en Ĉinio kiel mian propran aferon? Ĉu mi havas internaciisman kaj komunisman spiriton? En mia penso disvolviĝis batalo inter malbono kaj bono, inter postrestemo kaj progresemo. Iutage mi ree legis la artikolon *Rememore al Norman Bethune*. Prezidanto Maŭ diris: **“Ĉiu homo havas malegalan kapablon, sed sole kun tiu spirito, li jam estas homo nobla, pura, bonvirta, libera de malaltaj intereso kaj utila al la popolo.”** Tiuj vortoj profunde tuŝis mian animon. Mi sentis, ke la vortoj de Prezidanto Maŭ forte frapas min kaj puŝas min antaŭen.

Internaciismo ne estas abstrakta. En praktiko ĝi nepre sin montras en tiu ĉi aŭ tiu laboro per certa formo. Kun tiu problemo mi refoje legis *Rememore al Norman Bethune* kaj ekstaze trovis, ke la respondo ĝuste troviĝas en tiu artikolo. Prezi-

danto Maŭ diris: “La spirito de kamarado Bethune, lia kompleta sindono al aliaj sen ajna konsidero pri si mem, elmontriĝis en lia ekstreme respondecema sento al la laboro kaj lia ekstreme varma koro al kamaradoj kaj la popolo. Ĉiu kompartiano devas lin imiti.” Mi komencis ekzameni mian respondecon pri la laboro. Kiam mi atingis ian sukceson, mi komencis fieri kaj min mem laŭdi. Kial mi estis tia? Efektive mi strebis al renomo kaj deziris min mem montri kaj ke oni min flatu. Mi elmetis al mi alian problemon: “Ĉu kamarado Bethune tiel traktis sian laboron?” Kaj mi denove legis la artikolon. “**Farinte ion, ili eksentas ke ili havas grandan meriton, kaj ŝatas sin laŭdi, timante ke aliaj ne scias.**” La vortoj kvazaŭ estas aparte por mi skribitaj. Mi sentas honton, sed nun mi ekŝanĝiĝis.

Mi tre ĝojas ke mi trovis netakseblan trezoron, kiu estas nenio alia ol la verkaro de Prezidanto Maŭ, la penso de Maŭ Zedong, kiu prilumas la tutan mondon per senlima brilo. Nun, novan inspiron donis al mi la ĉina movado pri kreiva studo kaj kreiva apliko de la verkoj de Prezidanto Maŭ kaj la granda proleta kultura revolucio. La instrukcio de kamarado Lin Biaŭ pri la studo de la verkoj de Prezidanto Maŭ ĝustatempe kompreniĝis al mi, ke la studo celas nenion alian ol revoluciigi la penson kaj servi al la monda revolucio en internaciisma spirito kiel jam faris Bethune.

NEPRE TRAKTU

LA REVOLUCIAJN LABOROJN KUN REVOLUCIA SINTENO

Erwin Engst (Usono): Dum multaj jaroj mi iom post iom akiris kompare profundan konon pri la vortoj diritaj de Prezidanto Maŭ pri kamarado Bethune: “**Lia kompleta sindono al aliaj sen ajna konsidero pri si mem**” kaj “**lia ekstreme respondecema sento al la laboro kaj lia ekstreme varma koro al la kamaradoj kaj la popolo**”. En la mallonga artikolo *Rememore al Norman Bethune*, Prezidanto Maŭ montris al ni tre profundan penson: Kio estas la proleta mondkoncepto? Mi paŝon post paŝo komprenis ke kamarado Bethune fariĝis revoluciulo, ne pro la apartaj kondiĉoj de liaj laboro kaj vivo, sed ĉefe pro lia proleta mondkoncepto, ĝuste kiel Prezidanto Maŭ diris, “**li rigardis kiel sian propran la liberigan aferon de la ĉina popolo**”. Mi komprenis ke en iu ajn tempo kaj iu ajn loko, se nur la laboro (kia ajn ĝi estas), pri kiu ni nin okupas, utilas al la popolo, do ĝi estas revolucia laboro, kaj ni devas ĝin trakti kun revolucia sinteno. La baza problemo estas nia penso, sed ne la objektiva cirkonstanco.

Jam dudek jarojn mi vivis kaj laboris en Ĉinio. Plejparton de la tempo mi pasigis en kamparo. Antaŭ ol veni al Pekino, mi laboris en iu ŝtata farmo. Dum la nokta deĵoro mi ofte renkontis problemojn kiaj: telefono dum noktomezo informis ke maŝino difektiĝis, bovo malsaniĝis aŭ desinfektilo de lakto difektiĝis ktp. Tiam ekleviĝis en mia cerbo la egoisma penso: “Malgraŭ ĉio ĉi-nokte la ĉielo ne falos! Mi do dormu kaj lasu tion ĝis morgaŭ.” Sed alia penso instigis min rapide iri ekzameni ĉu mi povas helpi. En tia cirkonstanco mi laboris kune kun laboristoj tra la tuta nokto. Ĉiufoje kiam ni finfine solvis la problemon, mi sentis min tre feliĉa. Ĉar tiaokaze kamarado Bethune certe tiel agus, kaj ankaŭ Prezidanto Maŭ deziras, ke mi tiel agu.

Kiam ĉinaj laboristoj kaj kamparanoj informiĝis ke mi estas usonano, ili tuj rigardis min kiel reprezentanton de la usona laboranta popolo kaj rigore diferencigis min de la usonaj imperiistoj. Kaj ili esprimis al mi ardan kamaradecan amikecon. Kia spirito igis la 700 milionojn da popolanoj de Ĉinio tiel malami la imperiismon kaj tiel varme kaj amike trakti ordinaran usonanon? Kia spirito igis la 700 milionojn da ĉinaj popolanoj rigardi la aferon de la subpremataj popoloj en la tuta mondo kiel la sian? La 700 milionoj da ĉinaj popolanoj vivas kaj laboras en Ĉinio sed tenas la mondon en sia koro. Kia spirito tio estas? Tio estas internaciisma kaj komunisma spirito de la 700 milionoj da popolanoj de Ĉinio sub la eduko de la Komunista Partio de Ĉinio estrata de kamarado Maŭ Zedong. Laŭ mia opinio, ni ĉiuj devas serioze lerni tian spiriton.

EKZAMENU SIAJN PENSON

KAJ AGON PER LA

“TRI MALNOVAJ ARTIKOLOJ”

Dr. Joshua Horn (Anglio): Same kiel Bethune ankaŭ mi estas ĥirurgo. Mi laboris dek ok jarojn en angla hospitalo kaj kuracis malsanojn plejparte por laboristoj. Dum tiu tempo mi rigardis min kiel revoluciulon kaj opiniis ke mi estas konsiderinde respondecema por la laboro. Sed de post alveno al Ĉinio kaj leginte la artikolon de Prezidanto Maŭ *Rememore al Norman Bethune*, mi ekdubis pri mi mem: Ĉu mi vere estas konsiderinde respondecema pri laboro kiel mi opiniis en la pasinteco? Post la rememoro mi konstatis ke mia respondeca sento estas limigita kaj ne sufiĉa.

Antaŭ du tagoj mi faris gambo-amputan operacion por grava malsanulo, kiu estas estro de la

ligo de malriĉ-kampanoj kaj malsuperaj mez-kampanoj de iu popola komunumo. La operacio estis eksterordinare danĝera, kaj en la pasinteco mi certe pensus ke tion mi ne risku, ĉar malsukceso difektos la reputacion de kuracisto. Sed, lerninte la artikolon de Prezidanto Maŭ *Rememore al Norman Bethune*, mi pensis ke, se mi estas ekstreme respondecema, mi do devas fari por li la operacion. Sekve mi kaj miaj kolegoj faris la operacion. Nun mi povas diri kun ĝojo ke li eltenis la operacion. Se li povas resaniĝi, tio devas esti atribuita al la ekzemplo starigita por ni de Bethune kaj al la instruo de Prezidanto Maŭ en la artikolo *Rememore al Norman Bethune*.

La ideologia remuldo estas fundamenta problemo por ĉiuj revoluciuloj. Kaj la unua paŝo en tio estas sentime ekzameni la penson kaj agon, kun la tri malnovaj artikoloj *Servu al la Popolo*, *Rememore al Norman Bethune* kaj *Montotranslokigo Fare de Malsaĝa Avo* kiel kriterio. La tri malnovaj artikoloj jam puŝis min fari kelkajn paŝojn sur la longa vojo por fariĝi Bethune-stila komunisto. Tiun vojon mi irados dum la tuta vivo.

PRENU LA SPIRITON DE BETHUNE KIEL MODELON DE SIA AGO

Jaime Martins (Brazilo): Prezidanto Maŭ diris: “Estante fremdulo, li rigardis kiel sian propran la liberigan aferon de la ĉina popolo, sen ajna egoisma motivo. Kia spirito tio estas? Tio estas la spirito de internaciismo kaj komunismo, kaj ĉiu membro de la Komunista Partio de Ĉinio devas lerni de li tiun spiriton.”

Laŭ la instruoj de Prezidanto Maŭ, en la spirito de proleta internaciismo kaj sen ajna egoisma motivo, la ĉinaj kamaradoj laborantaj en fremdlandoj rigardas aferojn de alilandaj popoloj kiel la siajn. Ĉinio helpis Tanzanion konstrui grandan radistacion. La tie laborantaj ĉinaj kamaradoj loĝis en malnovaj tendoj ĉe la konstruejo, mem faris tablojn kaj benkojn el neuzeblaj lignpecoj. Ili ĉiutage laboras almenaŭ 10 horojn sub brula sunlumo. Ĉiufoje kiam ili renkontis malfacilojn, ili studis la tri malnovajn artikolojn por elĉerpi el ili forton.

Tiuj ĉinaj kamaradoj starigis por ni brilajn ekzemplojn ĉiam kaj ĉie praktiki la spiriton de Bethune en agoj.

La kompartianoj de Brazilo, Latinameriko kaj aliaj kolonioj, duonkolonioj kaj dependaj landoj, devas unuiĝi kun la proletaro de ĉiuj kapitalismaj

landoj “por povi faligi imperiismon kaj liberigi niajn naciojn kaj popolon” ĝuste kiel Prezidanto Maŭ diris.

En hodiaŭa mondo, tiu unuiĝo baziĝas sur la batalo kontraŭ imperiismo, nova kaj malnova koloniismoj estrataj de la usona imperiismo, kaj iliaj agentoj — la modernaj reviziistoj, kies kerno estas la gvidanta kliko de Sovetunio.

ELIMINU MI-ISMON, STARIGU KOLEKTIVISMON KAJ KLOPODU SIN REMULDI IDEOLOGIE

Thureya Nassor Seif (Tanzanio): La nivelo de mia kono pri klaso kaj klasbatalo estas ne alta, sed multe pli alta ol antaŭ mia alveno al Ĉinio. Mi devas danki la Komunistan Partion de Ĉinio, Prezidanton Maŭ kaj la ĉinan popolon, kiuj donis al mi plej necesan edukon.

La internaciisma spirito de d-ro Bethune estas tiu de servado al la monda popolo. Se iu volas fariĝi tia homo kia Bethune, li bezonas longdaŭran ideologian remuldon, antaŭ ĉio paŝon post paŝo elimini mi-ismon kaj starigi kolektivismon.

Kamarado Bethune neniam konsideris sian intereson, li estis tre entuziasma kaj tutanime servis al la aliaj, kaj havis tre fortan respondecon al la aliaj. Tio estas kvalito de tiu komunisma batalanto. Ni devas lerni de li.

Ĉinio estas plej bona lernejo por ĉiuj. Ni devas lerni de Bethune, de la herooj Vang Gie kaj Maj Hiande, kiuj iras la vojon de Bethune.

ĜISFINE BATALU LAŬ LA VOJO DE BETHUNE

Monique Dethiers (Belgio): En la cerbo ofte firme teni la sindonan spiriton de Bethune sen ajna konsidero pri si mem estas tre grava leciono por ni, eksterlandaj laborantoj en Ĉinio. Ni devas demandi al ni mem: Ĉu ni havas kuraĝon batali ĝisfine por nia kredo kiel Bethune? Se morgaŭ la usona imperiismo lanĉos lastan militon kaj vane intencos fari vivmortan militon kontraŭ Ĉinio — la baro por efektiviĝi ĝian hegemonion super la mondo (kaj la moderna reviziismo volas dividi tiun hegemonion), tiam Bethune sciigos al ni kiel ni devas firme teni nin sur la postenoj.

Dum sia tuta vivo, Bethune estas senegoisma kaj sentima. Lia hieraŭa batalo estas ankaŭ nia hodiaŭa batalo, ni devas batali ĝis la tago kiam la monda popolo finfine tenos sian sorton.



Gelaboristoj de la ŝpinteksejo "Oka de Marto" en Hanojo, Vjetnama Demokratia Respubliko, kantas "Ruĝas la Oriento".

Pri la Kanto "Ruĝas la Oriento"

Ruĝas la Oriento estas kanto plej ŝatata de la ĉina popolo, ĉar ĝi esprimas la ardan amon de la ĉina popolo al sia granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Ankaŭ multaj fremdlandaj amikoj ellernis tiun ĉi kanton kaj multaj eksterlandaj ensembloj ĝin prezentis publike.

En la jaro 1935, la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ alvenis al norda Ŝenhi-provinco, kaj tie komenciĝis agrara reformo, dank' al kiu suprenturniĝis la malriĉuloj, saltis el la senlima maro de mizero kaj ekĝuis bolantan vivon. Ili sentis profunde, ke simile al tio, ke fluo havas sian fonton kaj arbo havas sian radikon, ilia feliĉa vivo devenis de la Partio kaj Prezidanto Maŭ, kaj Prezidanto Maŭ similas al la suno leviĝanta en la oriento, kaj lumas ĉie kie ĝi brilas. En la jaro 1944, Li Joŭjuan, kamparano-poeto en norda Ŝenhi-provinco, kun tia patoso verkis la unuan strofon de la kanto adapte al la melodio de la plej ŝatata popolkanto "Sur Blanka Ĉevalo", kaj rapidege la kanto populariĝis inter la poloj.

Kun la disetendiĝo de la liberigitaj regionoj, pli kaj pli vastiĝis ankaŭ la regionoj, kie la kanto flugis de buŝo al buŝo kun ĉiam pli granda ŝatateco. Tra kolektiva kantado, la kanto kaj muziko ĝin akompananta ricevis plibonigon kaj altigon, kaj aldoniĝis al la teksto du novaj strofoj.

Prezidanto Maŭ ne nur gvidis la ĉinan popolon en la renversado de la superregantaj imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo, kaj ebligis la plenan liberiĝon de la ĉina popolo, sed ankaŭ ĝin gvidas en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado, kaj en la nuna etapo li ĝin gvidas en konduko de la senprecedenca granda proleta kultura revolucio. Tiu ĉi revolucio en la sfero de ideologio ja gravas por la venko de la batalo kontraŭ imperiismo, koloniismo kaj la moderna reviziismo, kaj decidas la perspektivon de la ĉina revolucio kaj la monda revolucio. La revoluciaj popoloj de la tuta mondo huraas pro la venko de la granda proleta kultura revolucio en Ĉinio, la revoluciaj popoloj tra la tuta mondo arde amas Prezidanton Maŭ kaj ĉiam pli multe da homoj kantas la kanton *Ruĝas la Oriento*

Ruĝas la Oriento



Dong fang hong, taj jang ŝeng, ĝong guo
 Maŭ ĝu ŝi aj ĵen min, ta ŝi
 Gong ĉan dang ŝjang taj jang, ĝaŭ daŭ



ĉu liaŭ ge Maŭ Ze- dong; ta ŭej ĵen min
 ŭo men di daj lu ĵen; ŭej liaŭ ĝjan ŝe
 na li na li ljang; na li joŭ liaŭ



moŭ ŝing fu, hu er haj jo, ta ŝi ĵen min da ĝju ŝing.
 ŝin ĝong-guo, hu er haj jo, lin daŭ ŭo men ŝjang ĉjan ĝin.
 gong ĉan dang, hu er haj jo, na li ĵen min de ĝje fang.

Dong fang hong (Ruĝas la oriento)

Taj jang ŝeng (Leviĝas la suno)

Ĝong guo ĉu liaŭ ge Maŭ Zedong (En Ĉinio aperis Maŭ Zedong)

Ta ŭej ĵen min moŭ ŝing fu, hu er haj jo (Li laboras por feliĉigi la popolon, hu er haj jo)

Ta ŝi ĵen min da ĝju ŝing (Li estas granda savanto de la popolo)

Maŭ ĝu ŝi aj ĵen min (Prezidanto Maŭ amas la popolon)

Ta ŝi ŭo men di daj lu ĵen (Li estas nia vojevindanto)

Ŭej liaŭ ĝjan ŝe ŝin ĝongguo, hu er haj jo (Por konstrui novan Ĉinion, hu er haj jo)

Lin daŭ ŭo men ŝjang ĉjan ĝin (Li gvidas nin marŝi antaŭen)

Gong ĉan dang ŝjang taj jang (La Komunista Partio similas al la suno)

Ĝaŭ daŭ na li na li ljang (Lumas ĉie, kie ĝi brilas)

Na li joŭ liaŭ gong ĉan dang, hu er haj jo (Kie aperas la Komunista Partio, hu er haj jo)

Na li ĵen min de ĝje fang (Tie liberiĝas la popolo)

Nova Antaŭensalto sur Ĉiuj Frontoj de Nia Nacia Ekonomio

Kiam la granda penso de Maŭ Zedong estas posedata de la vasta amaso, ĝi povas naski grandegan materian forton. Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ persone iniciatis kaj gvidas la senprecedencan grandan proletan kulturalan revolucion, kiu multege ekscitis kaj stimulis la revolucion spiriton de la vastaj amasoj de laboristoj, oficistoj kaj membroj de popoloj komunumoj sur la ekonomia fronto de nia lando, kaj tiel alportis al nia tuta nacia ekonomio pli novan fizionomion, pli novan prosperon kaj novan ĉiuf flankan antaŭensalton. Jam antaŭtempe superplenumiĝis la tuta tasko de la unua jaro de la Tria Kvinjara Plano de nia lando. Tio estas granda kuraĝigo al la revolucia popolo de Ĉinio kaj la tuta mondo, kaj peza bato al la imperiismo, la moderna reviziismo kaj ĉiuj reakciuloj.


La Red.

SUPERPLENUMIĜIS antaŭtempe diversaj taskoj de la unua jaro de la Tria Kvinjara Plano por disvolvi la nacian ekonomion de nia lando en 1966.


En 1966, en la agrokulturo ni venkis sufiĉe gravajn katastrofojn de la naturo, akiris grandan abundan rikolton en ĉiuj sferoj. Greno kaj kotonono estis rikoltitaj plej riĉe en tiu ĉi jaro el la

pasintaj deksep jaroj post la Liberiĝo. Bonegan situacion de riĉa rikolto havis diversaj industriaj plantoj, arbarkulturo kaj bestobredado. Kaj ilia produkta kvanto larĝe superis tiun de 1965.

Pliprodukto estis en ĉiuj branĉoj de la industrio. La antaŭfiksita pliprodukta plano en la industrioj de fer-ŝtalo, maŝinkonstruo, karbo, petrolo, elektra energio, kemio, konstrua materialo, ligno-



La revoluciaj laboristoj de la Dua Ilmaŝina Fabriko de Pekino forte rebatas la novan reatakon de la burĝa reakcia linio firme respondante al la alvoko "teni la revolucion kaj stimuli la produktadon". Jen laboristo de la Ruĝflaga Laboro laboras absorbite.



Responde al la granda alvoko de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ "teni la revolucion kaj stimuli la produktadon", alia oceana ŝipo Ĉaŭjang de 13,000 toneloj finkonstruiĝis kaj surakviĝas. Ĝi estas projektita kaj konstruita de ni mem.

kolektado kaj en ŝpinteksa kaj malpezaj industrioj estis superplenumita antaŭtempe. Grandnombre kreskis la specaro kaj ĝenerale altiĝis la kvalito. La totala produkta valoro de industrio en la tuta lando kreskis je pli ol 20 procentoj kompare kun tiu en 1965.

Tre bone plenumiĝis la taskoj de fundamentaj konstruoj en industrio kaj agrokulturo. La jam plenumitaj investoj kaj konstruaj projektoj multe superis tiujn de 1965. La tempo uzita por konstruado de multaj gravaj konstruoj reduktiĝis preskaŭ je duono kompare kun tiu en la pasinteco, kaj multe altiĝis ilia kvalito.

Sur la fronto de trafiko kaj transporto, en 1966, kvankam ŝargita per la tasko de transporto de dekoj da milionoj da revoluciaj instruistoj kaj lernantoj por fari la grandan revolucion interkontakton, la totala kvanto de var-transporto, tamen, superis la ŝtatan planon.

Rapidega disvolviĝo troviĝis en la kampo de scienco kaj tekniko. En 1966, sinsekvaj sukcesoj en la tri nukleaj provoj, en fabrikado de sinteza benzeno kaj de la sinteza kristala insulino kaj la apero de originala nova tekniko en la tuta procedaro de ekspluatado kaj rafinado de petrolo, kiun kreis la Daking-a Olekampo, ĉiuj markis

la atingon de la scienco kaj tekniko de nia lando al la progresinta nivelo de la sesdekaj jaroj.

En la bonega situacio de ĉiufanka pliprodukto en la industrio kaj ĉiufanka bonrikolto en la agrokulturo prosperiĝis ankaŭ la merkato de la tuta lando, kaj grandskale kreskis la aĉeta kaj venda kvantoj de varoj fare de la ŝtato kompare kun tiuj en 1965.

Ankaŭ bonega estas la stato de importo kaj eksporto kaj de la ŝtataj financaj spezoj de nia lando; la financa enspezo estis pli granda ol la elspezo.

Ĉio ĉi tio estas nova kaj granda venko de la penso de Maŭ Zedong!

Ĉio ĉi tio estas peza bato al la fiaj imperiistoj, modernaj reviziistoj kaj ĉiuj reakciuloj. Tiuj fiuloj vane intencis kaj klopodis fari ĉion por mensogi, ke la granda kultura revolucio de nia lando "sendube kaŭzos katastrofon al la ekonomio", kaj ke la produktado de industrio kaj agrokulturo "paraliziĝis" ktp. Tamen la laboranta popolo de nia lando armita per la penso de Maŭ Zedong komplete frakasis la fantazion kaj mensogojn de tiuj reakciaj fiuloj per siaj kreivaj, brilaj laborfruktoj.

Nia plenampleksa antaŭensalto sur la materia fronto estas alportita kaj antaŭenpuŝita de la granda antaŭensalto sur la spirita fronto. La granda materia forto estas formita el la granda spirita forto.

Tiu ĉi granda spirita forto estas la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong.

En sia letero skribita en marto 1966 pri kreiva studo kaj kreiva apliko de la verkoj de Prezidanto Maŭ sur la industria kaj komunika fronto, kamarado Lin Biaŭ, la intima batalamiko de Prezidanto Maŭ, diris: **Estas necese enkonduki la penson de Prezidanto Maŭ inter laboristojn kaj kamparanojn pere de kreiva studo kaj kreiva apliko de liaj verkoj, nur tiel povas esti ŝanĝita la mensa fizionomio de la laboranta popolo, kaj nur tiel povas esti transformita la spirita forto en grandan forton materian.**"

En 1966, responde al la alvoko de kamarado Lin Biaŭ, centmilionoj da laboruloj sur nia ekonomia fronto disvolvis kun entuziasmo la senprecedencan amasan movadon de kreiva studo kaj kreiva apliko de la verkoj de Prezidanto Maŭ, precipe de la "tri malnovaj artikoloj" kaj levis al tute nova stadio tiun amasan movadon de kreiva studo kaj kreiva apliko de la verkoj de Prezidanto Maŭ, kaj per tio puŝis antaŭen al tute nova stadio ankaŭ la revoluciigon de la homa ideologio kaj la aferon de produktado kaj konstruado.

Sur la agrokultura fronto, centmilionoj da kamparanoj pere de soifaj kaj kreivaj studo kaj apliko de la "tri malnovaj artikoloj", starigis en si la ideon terkulturi por la kolektivo kaj la revolucio, havigis al si la revolucian spiriton kaj bravan aspiron de "montotranslokigo fare de Malsaĝa Avo". Ili prenis Daĝaj-anojn kiel sian ekzemplon, timante nek la ĉielon, nek la teron, nek suferojn, nek malfacilojn, luktis pene, sin apogante sur la propraj fortoj, kaj disvolvis grandan ardan batalon por reformi la naturon kun neniontima heroeco kaj la apogo de la popolkomunumo, kiu ĉiam pli firmiĝas kaj disvolviĝas sub la direktado de la penso de Maŭ Zedong. Unuflanke, ili faris senprecedence gigantajn bazajn konstruojn de kampoj, aliflanke, ili kreive reformis la produktan teknikon kaj kultivan sistemon. En la sama tempo, oni rapidigis la disvolvon de la afero pri agrokultura mekanikigo, kaj tiel ebligis grandegan kaj profundan ŝanĝon de la tuta fizionomio de kampoj kaj gajnis grandan riĉ-rikolton en ĉiuj flankoj de agrokulturo.

Sur la industria fronto, la vastaj amasoj de revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la tuta lando,

prenis la "tri malnovajn artikolojn" kiel armilon, faris energie revolucian en la profundejo de sia propra animo, rompante forte la penson de "individuo", starigante forte la ideon de "kolektivo" kaj la mondan koncepton de tutkora kaj plenanima servado al la popolo, kaj sekve plivigligis multege la revolucian spiriton kaj naskis grandegan materian forton.

Ili firme kaj plene efektivigis serion da saĝaj decidoj, kiujn faris Prezidanto Maŭ, prenis Daĝaj-anojn kiel ekzemplon kiuj kuraĝas kaj bone scias revolucii, kuraĝas iri la vojon neniam iritan de antaŭuloj, grimpi sur la altan supron de monto neniam surgrimpitan de antaŭuloj, kaj tial puŝis la tutan teknikon de la industria produktado de nia lando al tute nova nivelo. Jam komenciĝis en nia lando la formiĝado de sendependa, memstara moderna industria sistemo, kompare kompleta en la branĉoj. Petrolon, kiel ekzemple, bezonatan de nia nacia ekonomio kaj nacia defendo, oni jam povas memprovizi en kvanto kaj specoj. Sufiĉas ankaŭ la ŝtal-produkto, kiun bezonas niaj industrioj de fabrikado de aŭtoj, traktoroj, precizaj instrumentoj kaj mezuriloj, de petrolkemio, aviadiloj, atomenergio k. a. Kompletajn ekipaĵojn, kiujn bezonas grandtipaj ferŝtalaj kombinoj, karbominejoj, petrolkampoj, olerafinejoj, kemifabrikejoj, cementaj fabrikejoj, elektraj centraloj, aeroplano-fabrikejoj, traktoro-fabrikejoj kaj fabrikejoj de diversaj maŝinoj, kiujn ni konstruos dum la periodo de la Tria Kvinjara Plano, ĉiujn ni povos produkti.

Kun plena kaj senlima fido pri venko, pli alte tenante la grandan ruĝan standardon de la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong, fervore studante kaj aplikante la verkojn de Prezidanto Maŭ, starigante en si la penson de Maŭ Zedong, pli bone praktikante la grandan alvokon de Prezidanto Maŭ pri ekprenado de la revolucio kaj stimulo de produktado, nun, centmilionoj da laboruloj de nia lando forbalaas ĉiujn obstaklojn sur la vojo de antaŭenmarŝado, puŝas la grandan proletan kulturalan revolucian al nova alttajo kaj per tio levas novan alttajdon de la produktado kaj konstruado por garanti pli grandan venkon sur batalfrontoj ambaŭ de spirito kaj materio. Ili decidis, en la jaro 1967, pli bone daŭrigi la plenumadon de serio da saĝaj politikoj ellaboritaj persone de Prezidanto Maŭ, kaj faros pli multajn kaj pli grandajn kontribuojn, por fari ĉiujn fakojn kaj ĉiujn entreprenojn grandaj lernejoj de la penso de Maŭ Zedong, por efektivi la Trian Kvinjaran Planon pli multe, rapide, bone kaj ekonomie kaj por konstrui nian landon en landon de la proletaro neniel detruoblan.



La komunumanoj de Daĝaj venkis kvinfoje naturajn katastrofojn kaj akiris abundan rikolton de greno, dank' al apliko de la penso de Maŭ Zedong.

Komunumanoj de Ĉeng-an-gubernio, Hebej-provinco, aktive vendas superfluan grenon al la ŝtato.



Brila Ekzemplo, Granda Kuraĝigo

Ĉinion Vizitantaj Eksterlandaj Amikoj
pri la Granda Kultura Revolucio

EN la jaro 1966, kiam la granda proleta kultura revolucio de Ĉinio akiris grandan venkon, ni varme bonvenigis la viziton de multaj eksterlandaj amikoj, kiuj venis el la kvin kontinentoj. Antaŭ aŭ post ilia revenvojaĝo, ili eldiris kun entuziasmo siajn opiniojn kaj impresojn pri la granda proleta kultura revolucio de Ĉinio. El la grandnombre persone aŭditaj kaj viditaj faktoj, ili profunde ekkomprenis, ke tiu ĉi kultura revolucio estas pli granda kaj pli ampleksa kaj havas pli profundan signifon ol ĉiu ajn revolucio en historio. Ili montris, ke la granda kultura revolucio de Ĉinio estas nova granda genia iniciataĵo de Prezidanto Maŭ kaj eminenta kontribuo al la internacia komunisma movado, kaj ĝi multe rapidigos nepre la historian procezon de la monda revolucio.

La estro de la Delegacio (dektria vizito al Ĉinio) de la Japana-Ĉina Amikeca Asocio Adaĉi Umejĉi diris: "Post la kupto de regpotenco kaj ŝanĝo de posedsistemo, la proletaro ankoraŭ bezonas konduki ideologian revolucion. Ĉar Sovetunio ne kondukis ideologian revolucion post la kupto de regpotenco kaj konstruo de socialisma bazo, aperis en ĝi la moderna reviziismo, kaj tio retiris Sovetunio al kapitalismo. La granda proleta kultura revolucio gvidata persone de Prezidanto Maŭ ĝuste celas solvi la problemon, por ke en la socialisma lando ne aperu reviziismo kaj Ĉinio neniam ŝanĝu sian koloron. Tio havas gravan signifon por la monda revolucio."

Dum la vizitado en Ĉinio de la delegacio de la parlamentanoj de la Sociala Partio de Japanio, la arde disvolviĝanta granda proleta kultura revolucio donis al ili tre profundan impreson. La estro de tiu ĉi delegacio Tate Kenziro diris: "Oni povas aserti, ke la granda proleta kultura revolucio gvidata de la penso de Maŭ Zedong estas senprecedence granda afero ekde la estiĝo de la terglobo kaj la homa historio. Ni vidis en la movado la disvolviĝon de granda debato inter lernantoj pri la problemoj kiel reformi edukan sistemon. Dekmiloj da laboristoj iris sur la stratojn por fari manifestacion kaj debaton. Ĉie regis vigleco. Dum la vizitado ni rimarkis, ke en Ĉinio oni metas la fortigon de la regpotenco sur la unuan lokon. La vero estas, kiam la bazo de la lando estas solidigita, la rapideco de konstruado povas esti pligrandigita. Kiam oni sukcesos bone reformi la edukan sistemon, la ĉinaj lernantoj povos en unu jaro ellerni tiom kiom povas ellerni la eksterlandaj lernantoj en tri jaroj. Ĉinio tre emfazas elstarigon de politiko, tio min multe inspiras."

Adama Traore, la komerca direktoro de la Malia Ŝtata Importa kaj Eksporta Kompanio, kiu laŭ invito partoprenis la Eksportan Foiro de Ĉinio, diris: "La granda proleta kultura revolucio de Ĉinio estas nova granda genia iniciataĵo de Prezidanto Maŭ kaj elstara kontribuo al la internacia komunisma movado." Li daŭrigis: "Ni propraokule vidis la revolucionan entuziasmon de la ĉinaj ruĝaj gvardianoj kaj sinsekvajn venkojn

akiritajn de la granda kultura revolucio gvidata persone de la granda kaj saĝa Prezidanto Maŭ. Pli grave estas, ke ni ekkomprenis la senkompare profundan historian signifon de la granda proleta kultura revolucio de Ĉinio. Ĝi estas ekstreme grava historia evento de la internacia komunisma movado.”

La estro de la Kultura Delegacio de Ĉilio Luis Oyarzun diris: “La granda proleta kultura revolucio estas la plej granda amasa movado en la ĉina historio. Prezidanto Maŭ Zedong pli bone, plenamplekse kaj kreive disvolvis marksism-leninism. La granda kultura revolucio estas ekstreme profunda revolucio, ĝi nepre havos profundan signifon por la monda revolucio kaj estas grava paŝo por akceli la mondan revolucion.”


La membro de tiu ĉi delegacio Ernesto Carmona diris: “Armante sin per la penso de Maŭ Zedong, la ĉina popolo neniam ŝanĝos la koloron de sia socialisma revolucio. La granda kultura revolucio nun unuigas la sepcentmilionan ĉinan popolon per la penso de Maŭ Zedong en unu homon. Tio estas forto entombigonta imperiismon kaj forto

nevenkebla.” Alia membro Sergio Montero diris: “La ĉina popolo eksonigis la klarigon de la granda kultura revolucio kaj firmigis la revolucion decidemon de la monda popolo.”

La estro de Delegacio de Urugvaja-Ĉina Kultura Asocio Eliseo Salvador Porta diris: “La granda kultura revolucio iniciatita kaj gvidata persone de Prezidanto Maŭ preventas la reatakon de la restaj fortoj de la burĝaro kontraŭ la proleta regpotenco kaj plue puŝas la proletan revolucion al pli profunda etapo, kiun atingis ankoraŭ neniu alia socialisma lando en la mondo. La granda kultura revolucio havas profundan signifon por la proleta revolucio. Post la kupto de regpotenco fare de proletaro ankoraŭ ekzistas klasbatalo. Sen granda kultura revolucio, la frukto de la venko de revolucio ne povas esti konservata, kvazaŭ fiŝo forglitanta tra la sennoda fundo de reto, kaj la revolucio perdiĝos duonvoje. Tial estas necese konduki la grandan kulturan revolucion ĝis la fino kaj kapti la ŝarkon — burĝaron por firmigi la rezulton de la revolucio. En Ĉinio ni vidis, ke la granda kultura revolucio havigis al la ĉina popolo grandegan forton.”

Japanaj junuloj interparolas kun geaktoroj de la Pekina Kantodanca Trupo, kiuj ludis la programeron “Heroa Ruĝa Gvardio”.





Siriaj junuloj rigardas fotojn pri la granda proleta kultura revolucio de Ĉinio.

Reveninte al la hejmlando post la vizito al Ĉinio la Delegacio de "Clartè Federation" de Svedio kun sento de entuziasmo kaj ĝojekscitiĝo unuvoĉe laŭdis, ke la granda kultura revolucio estas bonega. Iu membro diris: "Tiu ĉi revolucio estas ekstreme grava. La ĉina popolo prave agas. La revolucio estas tre necesa kaj por la ĉina revolucio kaj por la monda revolucio. Post kompleta forigo de la ideoj, kulturo, moroj kaj kutimoj de kapitalismo kaj feŭdismo, la vojo de restariĝo de kapitalismo povas esti radikale fermita. Tio estas pli profunda klasbatalo kaj daŭrigo de la socialisma revolucio de Ĉinio. Ĝi donis al ni forton kaj memfidon."

La sekretario de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Belgio Jacques Grippa varme laŭdis la grandan proletan kulturalan revolucion

de Ĉinio en iu studenta kunveno, reveninte hejmen post vizito al Ĉinio. Li diris: "La granda proleta kultura revolucio estas sufiĉe instrua por ni. Ĉinio estas kaj estos ruĝkolora! Tion atestas la venko de la granda proleta kultura revolucio. Ni devas protekti Ĉinion de la senbrida kalumnio farata de la reakciuloj. Ĉinio nun puŝas plue la socialisman revolucion antaŭen kaj kondukos ĝin ĝis la fino. Tio estas brila ekzemplo kaj granda kuraĝigo por ni."

Ni havas amikojn ĉie en la mondo. Ili unuanieme aplaŭdas la senprecedencan, grandan proletan kulturalan revolucion iniciatitan kaj gvidatan persone de Prezidanto Maŭ. Ili opinias, ke tiu ĉi revolucio ne nur decidas la sorton de la socialisma Ĉinio de proleta diktaturo, sed ankaŭ la sorton de la revolucia afero de la proletaro kaj de la subpremataj nacioj en la tuta mondo.

Internaciisma

Batalanto

— Norman

Bethune



K-do Bethune alvenas al Ĉinio trapasante milojn da lioj por helpi la ĉinan popolon en ĝia Kontraŭjapana Rezistmilito.



Al la plej antaŭa batalfronto.



Spite al sia laciĝo post longa marŝado, li tuj eniras en la malsanulĉambbron por kuraci la vunditojn.



Li traktis la vunditojn kaj malsanulojn intime kaj fratece. Jen li donacas sian litkovrilon al iu armeano grave vundita.



Iu kamarado vundiĝis. Por savi la batalamikon k-do Bethune alrapidas sola de fore je 50 lioj.



Li faris transfuzon de sia sango al iu vundito en bezono ke la batalanto en danĝero ricevis sian duan vivon.



Li skribas al Prezidanto Maŭ proponante, ke por plibonigo de la nutrado de vunditoj li volas oferi sian monon kiun la Partio donis al li ĉiumonate kiel subvencion.



Li persone kompilis instrumaterialojn por la medicinaj laborantoj kaj faras al ili lecionojn. Krome li ankaŭ gvidis ilin apliki la lernitajn en praktiko.



de urĝa operacio,

Eksplodas unu post alia obuso de malamiko ĉirkaŭ la operacia ĉambro, sed k-do Bethune diras aplombe: "Armea ĥirurgo devas ĉiam resti kune kun la batalantoj. Estas gloro eĉ se oferi la vivon dum laboro."



Bethune alvenis al la vilaĝo apud la areo okupita de malamiko kaj faras kuracadojn al dekoj da vunditoj tie kaŝitaj.

Li projektis kaj produktis programane diversajn kuracaparatojn kaj ŝarĝtransportilon por medikamentoj.



En la lasta momento de sia vivo Norman Bethune firme kuraĝigas siajn kamaradojn: "Klopodu al la granda vojo kaj kreu la aferon de progreso!"

Bonega Estas la Ruĝa Gvardio!

ANTAŬ vojaĝo al Ĉinio mi havis nur nebulan komprenon pri la granda proleta kultura revolucio de la lando, kiun longpaĝe kalumnias preskaŭ ĉiutage burĝaj reakciaj gazetoj, precipe, malice atakante la ĉinajn ruĝajn gvardianojn per la vortoj “perfortuloj”, “barbaraj” kaj “timindaj”. Pri fidindeco de tiu propagando mi estis necerta.

En la 28-a de septembro, mi venis al Kantono kaj vidis ruĝajn gvardianojn. Ĉe la komenco mi estis tre maltrankvila kaj rigardadis ilin de tempo al tempo, frotinte la okulojn. Poste ni vojaĝis de Kantono al Pekino kaj de Pekino al aliaj urboj kaj kamparoj por fari vizitadon. Post la vizitado mi volas laŭte krii: Bonegaj estas la ruĝaj gvardianoj, kiuj sin armis per la penso de Maŭ Zedong!

La ĉinaj ruĝaj gvardianoj estas plej simplaj kaj raciaj. Ili estas batalantoj, kiuj en ĉiu tempo estas pretaj forte rebati invadantajn malamikojn. Tamen, kiam ili renkontas amikojn, ili bonvenigas ilin varme. Ili estas heroaj kaj neflekseblaj batalantoj antaŭ malvero, kaj modestaj kaj lernemaj elementaj lernejoj antaŭ vero.

Ni faris vizitadon al urboj kaj kamparoj en Ĉinio. Ĉie ni vidis milojn kaj dekmilojn da ruĝaj gvardianoj. Ni plurfoje rimarkis, ke nemalmultaj ruĝaj gvardianoj iras al kamparanoj, aktive laboras kune kun ili kaj energie propagandas al ili la penson de Maŭ Zedong. La kamparanoj traktas la ruĝajn gvardianojn kvazaŭ siajn proprajn gefilojn, zorgante kaj gardante ilin kun tuta koro. Same kiel la kamparanoj, ankaŭ laboristoj aktive kaj varme bonvenigas ruĝajn gvardianojn el diversaj lokoj, akompanas ilin en rondrigardo kaj interŝanĝas kun ili pensojn kaj revoluciajn spertojn. En stacioj, ĉe aŭtobusaj haltejoj, en vagonaroj, ĉie oni ofte povas vidi, ke ruĝaj gvardianoj meminciate

helpas servantojn en iliaj laboroj kaj gemaljunulojn dum ilia en- aŭ el-vagoniĝo.

Ni ankoraŭ vidis, ke sub la kuraĝigo de la penso de Maŭ Zedong “**faru firman decidon, timu neniun oferon, konkeru ĉiujn malfacilojn por akiri venkon**”, miloj kaj dekmiloj da ruĝaj gvardianoj lernas de la malnovaj ruĝaj armeanoj, organizas longmarŝajn trupojn, trapasas montojn kaj riverojn, por veni al Pekino, la centro de la monda revolucio, kaj vidi la grandan instruanton, grandan gvidanton, grandan ĉefkomandanton kaj grandan direktiston Prezidanton Maŭ. La ruĝaj gvardianoj timas nek malfacilojn, nek morton. Ili estas plej fidelaj daŭrigantoj de revolucio.

En la senprecedenca, granda proleta kultura revolucio, kiu disvolviĝas en Ĉinio, la ruĝaj gvardianoj jam fariĝis la sturmantaj pioniroj de la revolucio. Ili diligente studas la penson de Maŭ Zedong, kiun ili prenas kiel fortegan revolucionan armilon por kuraĝe fari ribelon kontraŭ la malnova mondo. La granda proleta kultura revolucio de Ĉinio estas morta bato kontraŭ imperiismo kaj reviziismo kaj grandega subteno por la revolucia popolo de la mondo. Pro tio imperiismo kaj reviziismo kaj iliaj lakeoj malice distordas faktojn, kalumnias la grandan kulturalan revolucion de Ĉinio kaj precipe atakas la ruĝajn gvardianojn, sturmantojn de tiu ĉi revolucio. Tamen ilia senhonta trompa propagando nepre fiaskos komplete antaŭ faktoj.

Vivu Prezidanto Maŭ!

Vivu la granda proleta kultura revolucio!

Vivu la ruĝaj gvardianoj!

*La verkisto estas membro de la Delegacio de la Cejlona-Ĉina Amikeca Asocio, kiu vizitis Ĉinion en septembro de 1966.

Ni Ĝojas pro la Bona Jungeneracio de Nova Ĉinio!

DUM la lastaj monatoj, miloj kaj miloj da junaj batalantoj — ruĝaj gvardianoj — surgrimpis la montaron Tajhang por veni al Daĝaj el plej diversaj lokoj de nia patrio, tenante ruĝajn flagojn, kun pakajoj surdorse kaj ruĝe brilantaj libroj *Vortoj de Prezidanto Maŭ* enmane, kantante *Ruĝas la Oriento* kaj *Navigadon en Maro* *Oni Dankas al la Direktlisto*. Enirinte en la vilaĝon kaj demetinte la pakajojn, ili tuj konkure komencis vektoporti akvon kaj balai la korton por malriĉaj kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj, petis maljunajn malriĉajn kamparanojn rakonti al ili la historiojn de la vilaĝo, komunumo kaj familioj. Eĉ kiam ili surgrimpis sur montsupron por pririgardi, ĉiu el ili kunportis unu ŝtonon al la konstruejo. Ĝis nun la nombro de ŝtonoj alportitaj de la junaj batalantoj jam superis 40 milojn kaj ni decidis nomi la konstruatan postan deklivon “*Deklivo de Longmarŝantaj Ruĝaj Gvardianoj*”.

Fospurigi necesejon aŭ diserigi ŝtonojn, ili ĉian laboron faras, timante nek malpuron nek lacon. Dum densa neĝado, ili ankoraŭ daŭre portadis ŝtonojn por konstrui digon. Kiam ni konsilis ilin ripozi, ili respondis: “Ankaŭ tio estas hardado kaj trapaso de ventoj kaj pluvoj en la vivo.”

Foje, la fingro de iu komunumano estis vundita de ŝtono, kaj lernanto de iu universitato en Pekino tuj alprenis glu-plastron por ŝirmi la vundon al la komunumano, sed kiam aperis sang-vezikoj sur la manoj de la ruĝaj gvardianoj, ili neniam tion diris.



*Daĝaj-a veterana
heroo Gia Gincaj.*

Iu lernantino el Pekino — ne pensu pri tio ke ŝi neniam faris pezan fizikan laboron — ekprenis mian martelon pezan je dekoj da ĝinoj kaj ne volis forlasi ĝin. Mi admonis la gejunulojn labori ne tiel streĉe, sed ne sukcesis. Ili laboris kantante la kanton kun teksto el vortoj de Prezidanto Maŭ: **“Faru firman decidon, timu neniun oferon, konkeru ĉiujn malfacilojn por akiri venkon.”**

Tiuj junaj batalantoj havas neelĉerpeblajn fortojn. Ni vidas ilian tigran energion per niaj okuloj kaj pro tio ĝojas en la koro.

Kvankam multaj el la ruĝaj gvardianoj venas el urboj, tamen iliaj koroj ligiĝas kun la niaj.

Dek junaj batalantoj el Harbino ĉiu kolektis 50-100 kilogramojn da sterko sur la vojo de la guberniurbo Hijang al Daĝaj kaj poste donis ilin al nia brigado. Tri membroj de la longmarŝa trupo el Ŝandong, kolektis dum marŝado maizajn grajnoj perditajn survoje de aliaj, metis ilin en sakon kaj transdonis al ni kun surskribo de la vortoj de Prezidanto Maŭ: **“Por ke Ĉinio fariĝu riĉa kaj forta, ni bezonas tempon de dekoj da jaroj por luktadi en malfacilego, inkluzive la plenumon de la politiko praktiki rigoran ŝparon kaj oponi malŝparemon por konstrui nian landon en diligentema kaj ŝparema maniero.”**


La revoluciaj agadoj de la ruĝaj gvardianoj trankviligis nin. Antaŭe, burĝaj reakciuloj regis niajn lernejojn, ili bojkotis la edukon politikon elmetitan de Prezidanto Maŭ: **“Eduko devas servi al la proleta politiko; eduko devas kombiniĝi kun produkta laboro.”** Ili ne lasis la lernantojn partopreni fizikan laboron. Ili edukitoj ne havas la saman koron kiel ni malriĉaj kamparanoj

kaj malsuperaj mez-kampanoj. Iliaj agadoj plaĉas al imperiismo kaj reviziismo, kiuj vane esperas ke nia tria aŭ kvara generacio ŝanĝos sian koloron. Tamen ni malriĉaj kampanoj kaj malsuperaj mez-kampanoj tion absolute ne permesos!

Nia Prezidanto Maŭ ja estas sagaca kaj granda! Kaj la nodo, kiu pezas en nia koro disiĝis post la komenciĝo de la senprecedenca, granda proleta kultura revolucio, iniciatita de Prezidanto Maŭ. Ni Daĝaj-aj malriĉaj kampanoj kaj malsuperaj mez-kampanoj ĝojegas en la koro. Nun tiuj junaj batalantoj, kiuj kuraĝas pensi, kuraĝas agi kaj kuraĝas revolucii, venas inter nin marŝante, laŭ la alvoko de Prezidanto Maŭ, iri piede por fari revoluciajn interkontaktojn. La junaj revoluciaj batalantoj sin identigas kun ni malriĉaj kampanoj kaj malsuperaj mez-kampanoj, tiel intime kvazaŭ inter samfamilianoj. Iliaj haŭtoj fariĝis sunbrunaj, kaj iliaj koroj pli ruĝaj. Ili havas en la korfundo tute saman senton kiel ni, ili indas esti nomata bona jungeneracio edukita de Prezidanto Maŭ.

Lasu tremi la imperiistojn kaj reviziistojn antaŭ niaj junaj revoluciaj batalantoj!

**Prezidanto de la Asocio de Malriĉaj Kampanoj kaj Malsuperaj Mez-kampanoj de Daĝaj-brigado, Hijang-gubernio, Ŝanĥi-provinco.*



Ĉe la fino de la Kiantanggiang-pontego, kie Caj Jong-hiang oferis sian vivon, ruĝgardiaj batalantoj laŭlegas citaĵojn el verkoj de Prezidanto Maŭ por esprimi sian firman decidon marŝi antaŭen laŭ la vojo pretigita de Prezidanto Maŭ.

Bravaj Vortoj de Ruĝaj Gvardianoj en Longa Marŝado

☆ Preferu esti firma pino sur alta monto, ol esti floro aŭ herbo en vitra domo; preferu esti marhirundo en ŝtormo, ol esti birdeto sub tegmentrando.

☆ “Mem iri renkonte al malfaciloj” estas esprimo de memkonscia revolucio. Kiu volas revolucii, devas havi tiun revolucion spiriton

“mem iri renkonte al malfaciloj”. La proleta revolucia batalanto devas havi kuraĝon renkonti malfacilojn kaj temperamenton ĝoji renkonti malfacilojn.

☆ Sekure estas rajdi sur la dorso de bovo, el tio tamen ne eltrejniĝas brava rajdisto; malfacile estas rajdi sur sovaĝa ĉevalo, tamen el faloj elforĝiĝas bonega rajdisto.

☆ Kvankam ni ne havis la ŝancon partopreni la Longan Marŝon de 25,000 lioj entreprenitan de la Ĉina Ruĝa Armeo, tamen ni havas la feliĉon partopreni la grandan proletan kulturen revolucion kaj la grandan revolucion interkontaktadon. La vojon, kiun iris la antaŭa generacio de la revolucio, ni mem devas persone tramarŝi; kaj la ventojn kaj prujnojn, kiujn spertis la antaŭa generacio de la revolucio, ni mem devas persone gustumi.



Kamarado Vang Juçang kiu kripliĝis en mano sed ne en spirito, persiste studas verkon de Prezidanto Maŭ dum resanigado kaj faras notojn per la maldekstra mano.

HIE VU:

Vang Juçang

— Modela

Soldatamanto

La Ĉina Popola Liberiga Armeo armita per la penso de Maŭ Zedong estas armeo de la popolo. La oficiroj kaj soldatoj en tiu ĉi armeo rilatas unuj kun la aliaj surbaze de plena egaleco. Ili reciproke amas kaj prizorgas sin, ne nur kiel intimaj batalamikoj sed ankaŭ kiel klasaj fratoj, kiuj sin amas reciproke kvazaŭ veraj fratoj. La rakonto pri k-do Vang Juçang, proviantisto de iu trupo de la aera armeo ĉe la Fugian-a fronto, kiu oferis sin por savi sian batalamikon, estis vaste ĉirkulanta tra la tuta Ĉinio. Tio estas nova brila ekzemplo, kiu montras la novan rilaton inter la oficiroj kaj soldatoj de la Popola Liberiga Armeo.

K-do Vang Juçang naskiĝis en la familio de malriĉa kamparano en Ŝandong-provinco. Post aliĝo al la Ĉina Popola Liberiga Armeo, sub la nutrado de la penso de Maŭ Zedong, li fariĝis bona batalanto de Prezidanto Maŭ kaj bona funkciulo de la armeo. Li rigardis ĉiun batalanton kiel sian klasan fraton. Li multe prizorgis la ĉiutagan vivon de la batalamikoj kaj, precipe, ilian progreson en politiko kaj ideologio. Li neniam forgesis kreive studi kaj kreive apliki verkojn de Prezidanto Maŭ, kaj li konstante edukis la batalantojn per la penso de Maŭ Zedong. Liaj komunisma ideologio kaj malcedema spirito de

malmol-osta proleto montriĝis en multaj kortuŝaj agoj. Jen estas nur kelkaj fragmentoj.

RISKI LA VIVON POR SAVI BATALAMIKON

Matene en la 30-a de majo, 1965, Vang Juĉang estis kun malgranda taĉmento sur montdeklivo por fari ekzercon de grenadjetado. La armea barbiro unuafoje faris tiun ekzercadon. Li tro uzis sian forton, tiel ke la grenado flugis al la direkto de dorso. Ĝi ĵetiĝis kontraŭ roko, resaltis kaj ruliĝis en la direkto al ŝirmejo dekstre, en kiu la skribisto Vu Hjubin faris registrojn kun mallevita kapo, tute ne havante eblecon eviti la danĝeron.

En tiu kriza momento Vang Juĉang senhezite saltis el sia propra ŝirmejo kaj sinĵetis al la fumanta grenado. Li ne sukcesis atingi ĝin je la unua movo. Li tuj ankoraŭfoje impetis antaŭen kaj ekkaptis la feran ekstremajon de la grenado rapide turniĝanta. Sed la tempo jam mankis por forĵeti ĝin.

Nun li decidis savi sian batalamikon, eĉ se li devos oferi sian vivon. Li tuj retiris sian brakon provante forĵeti la grenadon kaj samtempe turnis sian korpon tiel ke ĝi tute ŝirmu Vu Hjubin. Ĝuste en tiu ĉi sekundo, tondre eksplodis la grenado en lia mano. Vang Juĉang estis grave vundita, dum Vu Hjubin ricevis nur malgrandan frotvundon.

“ANTAŬENMARŜI SUR LA VOJO DE REVOLUCIO EĈ PER SOLA GAMBO”

La batalanto armita per la penso de Maŭ Zedong estas plej sentima. Tia estas Vang Juĉang. Lia vundo estis treege grava. Lia dekstra gambo suferis miksan ostrompon. Kvar fingroj de lia dekstra mano estis deŝiritaj de la eksplodo. Liaj ventro kaj ambaŭ gamboj estis vunditaj je dekoj da lokoj. Fragmentoj de la grenado eniĝis en liajn stomakon, pulmon kaj hepaton. Krome, li tro multe sangadis, kaj lia vivo estis en danĝero. La unua granda operacio post lia enhospitaliĝo daŭris dek horojn. Kiam li reakiris sian konscion, lia unua demando estis: “Kiel fartas la skribisto? Ĉu li estas en danĝero?” Tio, kion li unue pensis, estis la sekureco de la batalamiko kaj la laboro de la Partio. La dolorego post la operacio tiel akre suferigis lin, ke lia kapo ŝvitis per fabgrandaj gutoj, kaj la ŝvito el lia korpo tramalsekigis la litkovrilon kaj matracon. Sed li neniam ĝemis, kaj li rifuzis injektadon de kontraŭdolora medikamento. Kiam ĉe lia dekstra gambo aperis simptomo de “mortiĝo”, kaj la armeo konsentis la proponon pri amputo fare de la hospitalo, li senhezite diris: “Mi obeas la decidon de la Partio rilate al ĉiuj aferoj.”

Kiam liaj vundoj iom reboniĝis, li tuj helpis aliajn malsanulojn batali kontraŭ siaj malsanoj kaj studis kune kun ili *Vortojn de Prezidanto Maŭ*. Li diris al ili: “Ankaŭ tio estas pro revolucio, ke ni kuraciĝas por resanigi nin, tial ni ankaŭ devas apogi nin sur la penso de Maŭ Zedong.”

Post la amputo la flegistinoj timis, ke li ĉagreniĝos, kaj ne kuraĝis lasi lin vidi la stumpon de sia dekstra gambo. Kontraŭe, li diris konsole al la flegistinoj: “Ne pensu, ke mi ĉagreniĝos. Mi ankoraŭ havas miajn maldekstrajn manojn kaj gambon. Estas plej grave, ke mi havas koron por servi al la popolo. Se nur mia spiro ankoraŭ daŭras, ĉiun minuton mi povos labori por la Partio.” Samtempe li skribis en sian taglibron: “Kvankam mi havas nun nur unu gambon, tamen,

Kamarado Vang Juĉang, kies dekstra gambo estas amputita, obstine ekzercis sin en irado post ricevo de artefarita gambo.



per grandaj paŝoj, mi antaŭen marŝos sur la vojo de revolucio per sola gambo.”

“VIVU PREZIDANTO MAŬ!”

Kiam Vang Juĉang restis en hospitalo, lia edzino venis de lia hejmloko kun ilia 14-jara filo. Vidinte, ke lia dekstra mano estas tute vindita kaj lia dekstra pantalonotubo estas malplena, ŝi tiel ĉagreniĝis, ke ŝiaj larmoj fonte falis. Sed Vang Juĉang konsolis ŝin ridante: “Estu trankvila. Ne estas batalo sen ofero. Iuj el la kamaradoj, kiuj aliĝis al la armeo kune kun mi, jam oferis sian valoran vivon por la revolucio, kaj mi nur ricevis vundon. Kio ĉagreninda estas en tio!”

Al la filo apudstaranta li diris: “Ĉu la instruisto ne admonis vin sekvi la ekzemplon de onklo Lej Feng? Kion onklo Lej Feng farus, se li estus en mia loko?”

“Li certe farus same kiel vi,” respondis la filo.

Vang Juĉang ekridetis, sed lia edzino silentis rigardante lian amputitan gambon. Li daŭrigis: “Kion vi pensas? Ĉu mi devis tion fari aŭ resti senfara rigardante la vivoferon de klasa frato?”

“Kompreneble vi devis tion fari. Sed vi estas tiel grave vundita, do kiel vi laboru en la estonteco?” “Tio estas nenio.” diris Vang Juĉang, “kripliĝis la dekstra gambo, sed restas la maldekstra. Kripliĝis la dekstra mano, sed restas la maldekstra. Nun mi jam povas skribi per mia maldekstra mano. Jen vidu!” Kaj li prenis plumon per sia maldekstra mano kaj skribis kelkajn vortojn. Lia edzino ricevis la paperon kaj trovis, ke sur ĝi estis regule skribitaj la vortoj “Vivu Prezidanto MaŬ!”

Tiuj tri vortoj resumis la milojn kaj milojn da vortoj, kiujn Vang Juĉang deziris eldiri, kaj ankaŭ prilumis la menson de lia edzino — virino el kamparo. Post kiam ŝi revenis al la hejmo, ŝi skribis al la estro de la trupo, ke ŝi sentas, ke ŝia edzo fariĝis pli supera, kaj ŝi volas lerni de li, aŭskulti la vortojn de Prezidanto MaŬ, prizorgi la interesojn de la kolektivo kaj eduki la infanojn por ke ili imitu la ekzemplon de la patro.

KORO ĈE KORO KUN LA BATALANTOJ

Tio estis la kvina fojo, ke Vang Juĉang riskis sian vivon por savi batalamikon. Li vere agis laŭ la instruo de Prezidanto MaŬ, ke “niaj funkciuloj devas zorgi pri ĉiu batalanto” kaj laŭ sia propra ĵuro: “Zorgi pri la batalantoj estas zorgi pri la revolucio, kaj por la revolucio mi povas riski ĉion mian.”

En la roto Vang Juĉang havas plej sincerajn kaj profundajn klasan senton por kaj revolucian amikecon kun ĉiu batalanto. Li diris: “Ĉiu kamara-

do en la roto estas mia frato.” Kiam iu el la batalantoj estas malsana, ofte li mem ne povas bone manĝi kaj dormi. Foje Ĝu Ĉajŝu, unu el la batalantoj, malsaniĝis, kuŝis en la lito kelkajn tagojn kaj nenion manĝis. Li informiĝis, ke Ĉu devenis de fiŝista familio, kaj plej ŝatas manĝi krabojn. Tial li decidis aĉeti krabojn kaj prepari ilin kun vermiĉelo por eksciti lian apetiton. Sed kraboj ne estis haveblaj en ĉirkaŭaĵo. Li iris de unu vilaĝo al alia kaj sukcesis aĉeti kelkajn grandajn krabojn nur en loko de kelkaj liojn for. Kiam Ĉu Ĉajŝu levis la bovlon, en kiu estis vermiĉelo kun bongusta krabviando, li emociiĝis ĝis larmo.

En alia fojo, kiam estis malvarma printempo, torenta pluvo inundis la batalpozicion. Laboregante ĝis la 12-a horo noktmeze, la batalantoj fine transportis ĉiujn pafillegojn kaj aliajn materialojn al sekura loko. Kiam ili revenis al la tendaro, ĉiuj tremis pro malvarmo. Ĝuste tiam Vang Juĉang venis kaj portis al ili ŝvitigan varman zingibran dekoktaĵon en bovloj. Ĉiuj batalantoj sciis, ke same kiel aliaj ankaŭ li penegis dum la tuta tempo kaj sentis malvarmegon kaj laciĝon. Malgraŭe, li zorgis nur pri la aliaj, sed ne pri si mem. Ĉiuj estis tre dankemaj antaŭ la varma zingibra dekoktaĵo.

ZORGO PRI LA MATURIĜO DE LA BATALANTOJ

En sia taglibro Vang Juĉang iam skribis: “La Partio donis al ni la taskon kulturi daŭrigantojn de la revolucio, tial ni devas zorgi pri ili kvazaŭ iliaj parencoj.” Estas vere, ke Vang Juĉang ĉiuflanke prizorgis la maturiĝon de la batalantoj.

Kiam Vang Juĉang estis rotestro, la mezuristo Liu Kinĉuan deziris transposteniĝi por fariĝi bredisto. Post detala enketo Vang Juĉang trovis, ke juna Liu havas malfacilon en lernado de la tekniko. Li do iris al la subplotono de Liu por kune kun li ekzerciĝi, konkeri la malfacilojn kaj trovi la ĉefajn punktojn de la tekniko. Li ankaŭ studis kune kun Liu la verkon de Prezidanto MaŬ: *Montotranslokigo Fare de la Malsaĝa Avo*. Kaj poste li kuraĝigis lin: “Juna Liu, por esti plene hardita en tekniko, vi devas unue esti plene hardita en penso. Sen personaj konsideroj kaj malĝustaj pensoj kaj imitante la “Malsaĝan Avon” por forigi ĉiujn malfacilojn, vi certe povos ĉiam pli bone mastri la teknikon per diligenta ekzercado.” Ekde tiam Liu Kinĉuan ekhavis plialtan politikan konscion, forĵetis la penson pri transposteniĝo kaj konkeris la citadelon de tekniko. Pli poste li estis titolita batalanto kun kvin bonoj, aliĝis al la Partio kaj fariĝis estro de la subplotono.

En la telefona grupo de la kvina roto estis kvar kamaradoj, kiuj ne sufiĉe intime rilatis inter si. Vang Juĉang faris profundan enketon kaj informiĝis, ke ili venis de tri provincoj, kaj la ĉefa kaŭzo estas, ke la grupestro ne bone faris sian laboron kiel grupestro. Vang Juĉang kore interbabilis kun ĉiu el ili aparte, kaj studis la verkon de Prezidanto Maŭ *Servu al la Popolo* kune kun ili. Li diris: “Vidu, Prezidanto Maŭ kvazaŭ iam estus veninta ĉi tie. Li diris, ke ni alvenis el plej diversaj anguloj de nia lando. Estas vere, ke ni kvin homoj venis el kvar provincoj kaj kolektiĝis kune ĉiuj kun la komuna revolucia celo...” Apenaŭ li finis siajn vortojn, la aliaj kvar honte klinis siajn kapojn kaj ĉiu faris sinkritikon. De tiam la tuta grupo unuiĝis en malgrandan kolektivon plenan de klasa amikeco.

NENIAM FORGESI PRI STUDIO DE LA VERKOJ DE PREZIDANTO MAŬ

La kaŭzo, kial Vang Juĉang havis la spiriton de sinofero por savi siajn batalamikojn, klasan amikecon por prizorgi siajn batalamikojn kaj malmolan ostaron de ĉiamrevoluciulo kaj revolucionan optimismon, timante nek suferon nek morton, kuŝas en tio, ke li vere observis la jenan admonon:

“legi la verkojn de Prezidanto Maŭ, aŭskulti la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj sekvi la instrukciojn de Prezidanto Maŭ.”

Kiam Vang Juĉang estis rotestro, la batalantoj de la roto trovis, ke li estas plej ŝparema, sed liaj piloj forkonsumiĝis pli rapide ol tiuj de la aliaj. Kial? Pli poste ili malkovris la sekreton: ĉiuvespere li kuŝis en la kulvualo kaj legis verkojn de Prezidanto Maŭ sub la lumo de elektra torĉo.

Post lia enhospitaliĝo li ankoraŭ neniam forgesis pri studo de la verkoj de Prezidanto Maŭ, kvankam treege seriozaj estis liaj vundoj. La unua afero, kiun li faris ĉiumatene, estis studi verkojn de Prezidanto Maŭ. Ne povante uzi la manon, li foliumis la libron per sia lango. Lia dekstra mano estis for, li skribis notojn per sia maldekstra mano.

Kvankam li ne estis sufiĉe klerigita, tamen li persistis en sia studo kaj neniam interrompis ĝin. Kun la helpo de vortaro li finstudis la kvar volumojn de la “Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong”, kaj parton de la artikoloj li legis multfoje. Vang Juĉang estas bona partiano kaj bona funkciulo, armita per la penso de Maŭ Zedong, kaj meritas la titolon de modela soldatamanto.

Kamarado Vang Juĉang studas verkon de Prezidanto Maŭ kune kun novaj batalantoj.





Veĵ Fengĵing lernas verkon de Prezidanto Maŭ kune kun siaj familianoj.

VEJ FENGJING*:

Duobla Venko en Revolucio kaj Produkto

SUB la brilo de la granda penso de Maŭ Zedong kaj per montrenversa potenco, nia popolo batalas kontraŭ la plenmano da potenctenantoj en la Partio, kiuj iras la kapitalisman vojon, kritikis la burĝan reakcian linion, elfosas la radikon de kontraŭrevolucia reviziismo kaj enradikas la grandan penson de Maŭ Zedong. La granda kultura revolucio faris terrenversan ŝanĝon en la fizionomio de nia granda patrolando, skuis la tutan mondon kaj donis grandan influon al la monda revolucio.

La jam akirita granda batalrezulto montras, ke la granda proleta kultura revolucio, iniciatita kaj gvidata de nia plej estimata kaj amata granda

gvidanto Prezidanto Maŭ, akcelis la revoluciigon de la homa ideologio. Ĉi tiu revolucio estas fidinda garantio por elradiki reviziismon, frakasi la restarigon de kapitalismo kaj sukcesigi la socialisman kaj komunisman aferon en nia lando. Ĝi estas grava disvolviĝo de marksism-leninismo kaj granda iniciato.

Navigadon en maro oni dankas al la direktlisto, ĉiuj vivaĵoj kreskas dank' al la suno, kaj tio, al kio oni dankas la irigon de la revolucio, estas la penso de Maŭ Zedong. Ni senlime amas, senlime kredas kaj senlime adoras nian grandan gvidanton Prezidanton Maŭ. Ni devas lasi la instrukcion de

Prezidanto Maŭ engravuriĝi en nia cerbo, solviĝi en nia sango kaj enradikiĝi en nia agado, rigardi la kreivan studon kaj kreivan aplikon de verkoj de Prezidanto Maŭ kiel la unuan bezonon de la vivo.

La alta tajdo de revolucio akcelas la altan tajdon de produkto. Prezidanto Maŭ diris: “La stil-ĝustiga kampanjo kaj la produkta movado, komencitaj unu post la alia en 1942 kaj 1943 kun universala karaktero, ludis kaj ludas decidan rolon respektive en la spirita vivo kaj en la materia vivo. Se ni ne tenus tiujn ĉi du ĉenerojn ĝusttempe, ni ne povus kapti la tutan ĉenon de la revolucio, kaj ankaŭ nia batalo ne povus antaŭenmarŝi plu.” Nur per preno de la revolucio en la manoj, oni povas progresigi la produktadon kaj akceli la plenumon de diversaj taskoj. Ni prenis en la manoj la revolucion kaj stimulis la produkton, per tio ni kreis favorajn kondiĉojn por antaŭtempe superplenumi la taskojn de la unua jaro de la Tria Kvinjara Plano. La faktoj montras, ke ĉiam kiam ni tenas la klasan batalon, tiun ĉefan ĉeneron, en la manoj nia socialisma konstruado rapide progresas antaŭen.

En tiu ĉi granda proleta kultura revolucio, nia fabriko kontraŭbatalis kaj kritikis plenmanon da potenctenantoj en la Partio, kiuj iras la kapitalisman vojon, kaj burĝaj teknikaj “aŭtoritatuloj”, kaj disvolvis kritikon pri la burĝa reakcia linio. La vastaj amasoj de revoluciaj oficistoj kaj laboristoj turnis sian revolucion entuziasmon levitan dum tiu ĉi granda proleta kultura revolucio sur la laborojn por progresigi la produkton. La revoluciaj oficistoj kaj laboristoj en nia laborejo penis kreive studi kaj kreive apliki verkojn de Prezidanto Maŭ, serioze efektivigis la instrukcion de Prezidanto Maŭ “teni revolucion, stimuli la produkton”, aktive partoprenis en la movado kaj firme persistis sur siaj laboraj postenoj. Ĉiuj ĵuris fariĝi revoluciaj pioniroj kaj sturmantoj en produkto, plenumante ambaŭ taskojn samtempe, entuziasme partopreni en la movado unuflanke, kaj aktive produkti aliflanke. La spirita fizionomio de la popoloj multe ŝanĝiĝis, aperis nova stato de produkta antaŭensalto kaj pro tio oni plenumis la unuajaran produktan taskon de la Tria Kvinjara Plano duonmonate antaŭ la fiksita dato.

Veĵ Fengjing rakontas sian dolorplenan familian historion al siaj gekamaradoj.






Vej Fengjing aktive partoprenas la grandan proletan kulturalan revolucion. Jen ŝi skribas opiniafiŝon.

En la pasinteco, nia laborejo plenumis la produktan taskon ĉiam tre malfacile. La novaj produktaĵoj iom post iom plimultiĝis, sed instalaĵoj, laborforto kaj teknologiaj ekipaĵoj estis ĉiam postrestintaj. Por trovi la kaŭzon de la postrestinteco de produkto ni pene studis verkojn de Prezidanto Maŭ kaj fine trovis, ke la povo pri teknikaj aferoj en la fabriko ne estas tenata en la manoj de laboristaj amasoj, sed en la manoj de la burĝaj teknikaj "aŭtoritatuloj", kiuj estas timemaj kaj ne kuraĝas preni sur sin respondecon, ne volas iri la vojon de sinapogo sur la propraj fortoj, oponas la amasan linion, imponas la aliajn per la rutinaj reguloj kiujn ili lernis de eksterlando. Tion ni ne povis toleri kaj ne estis plu permeseble ke ili katenu daŭre niajn manojn kaj piedojn. Prezidanto Maŭ diris: **"Ni estas por tio, ke ni apogu nin sur la propraj fortoj. Ni esperas havi eksterajn helpojn, sed ni ne devas apogi nin sur ili. Ni apogas nin sur nia propra penado kaj sur la iniciatemo de la tuta popolo kaj armeo."** Kompreninte la veron de sinapogo sur la propraj fortoj post la studo de verkoj de Prezidanto Maŭ, ni decidis liberigi nin per niaj propraj fortoj kaj iri la vojon, kiun neniam iris la antaŭuloj, kaj kuraĝis surgrimpi altan pinton de la scienco kaj tekniko por trovi novan propran vojon.

Dum la granda kultura revolucio, ni ribelis kontraŭ la burĝaj teknikaj "aŭtoritatuloj", forpuŝis tiujn obstaklojn de sur la vojo antaŭ ni, frakasis la rutinajn regulojn el eksterlando, kiuj malhelpis la produkton, kaj detruis la malnovajn sistemojn, kiuj katenis niajn manojn kaj piedojn. Tiel aperis nova situacio en la laborejo. Ŝanĝiĝis la pensoj de la homoj kaj la ekipaĵoj en la laborejo, tiel ke la produktkvanto kreskis rektlinie. Prenu kiel ekzemplon, la risortajn produktaĵojn, kiujn ni jam produktis dum jaroj. En la pasinteco, ni ne povis plenumi la produktan taskon, eĉ se ni sturmis en ĉiu monato. Tio grave malhelpis la glatan iradon de la laboro de aliaj laborejoj. La ĉefa kaŭzo kuŝis en tio, ke la tuta malnova teknologia ekipaĵo dividis malracie la laborprocedojn en pli ol dek paŝoj, formante netranspaseblajn abismojn, kiuj interrompis la normalan rilaton inter la laboristoj, kiuj zorgis pri la sinsekvantaj laborprocedoj. Tio kreis senbezzone kontraŭdirojn, kiuj malhelpis normalan iradon de la produkto. Prezidanto Maŭ diris: **"Ĉio reakcia ja ne falos, se vi ĝin ne faligas. Tio okazas same kiel ĉe balaado: kie ne alvenas la balaĵilo, la polvo kutime ne foriras per si mem."** Bazante nin sur la revolucia spirito kuraĝi pensi, agi kaj iniciati, ni rompis la rutinajn regulojn



Vej Fengjing provas plibonigi maŝinon kune kun laboristoj.

el eksterlando, liberigis la produktajn fortojn, ŝparis laborfortojn, kaj antaŭtempe plenumis la taskon ĉiumonate. La laboristoj kun ĝojo diris: “Estas bone rompi la rutinajn regulojn, tio estas venko de la granda proleta kultura revolucio.”

Ni ne nur frakasis la rutinajn regulojn el eksterlando, kiuj katenis la produkton, sed ankaŭ efektivigis 10 gravajn teknikajn renovigojn. Sub la konduko de la penso de Maŭ Zedong kaj en la spirito de sinapogo sur la propraj fortoj, ni kunlaboris unuanime kaj faris dukapan aŭtomatan tranĉan maŝinon en la daŭro de tri monatoj, kaj per tiu ĉi maŝino preskaŭ duobligis la efikecon de laboro. Por memori ke la maŝinoj estas produktaĵoj de granda kultura revolucio, oni nomas ilin “Kultura Revolucio n-ro 1”, “Kultura Revolucio n-ro 2” ktp. Dank’ al la 10 teknikaj renovigoj, ni ŝparis 28 laboristojn kaj 15 ilmaŝinojn kaj elektromaŝinojn. Nun, la taskoj de nia laborejo ne estis reduktitaj, tamen ni elsendis 28 personojn por helpi aliajn laborejojn kaj cetere superplenumis taskojn ĉiumonate. Ĉio ĉi tio estas rezulto de la fakto ke ni estas nutrataj de la penso de Maŭ Zedong kaj stimolataj de la granda proleta kultura revolucio al la revoluciigo de la ideologio.

Responde al la alvoko de vic-prezidanto Lin Biao ni decidis firme studi la “tri malnovajn artikolojn” de Prezidanto Maŭ kiel sentencon. Ni uzos ilin kiel spegulon, por kontroli nian agadon, eliminis el ni egoismon, starigos en ni kolektivismon, firme batalos kontraŭ “mi-ismo”, transformos nian mondkoncepton per ĉiuj fortoj, elradikos egoismon kaj enradikos en nia kapo la penson de Maŭ Zedong. Ni studos la verkojn de Prezidanto Maŭ, faros la revolucion, transformos la ideologion kaj servos al la ĉina popolo kaj la popoloj de la tuta mondo dum nia tuta vivo.

Ni antaŭeniros en ventegoj kaj ondegaj post Prezidanto Maŭ, firme sekvos la proletan revolucion linion de li reprezentatan, ĝisfunde kritikos la burĝan reaktan linion, serioze efektivigos la “Decidon de la Centra Komitato de Komunista Partio de Ĉinio Koncerne al la Granda Proleta Kultura Revolucio”, bone plenumos la taskojn de batalo, kritiko kaj reformo, tie indikitajn, firme tenos la revolucion kaj stimulos la produkton por gajni duoblan venkon en revolucio kaj produkto.

* *Laborista inĝenierino de la Nordorienta Maŝin-fabrika*

Sintezita Kristala Insulino

POST penlaborado dum 6 jaroj kaj 9 monatoj, sciencaj laborantoj de Ĉinio sukcesis, unuafoje en la mondo, sintezi per artefara metodo specon de proteino kun biologia vivpovo — kristala insulino. Tiu ĉi brila sukceso de scienca eksperimento signas grandan antaŭenpaŝon de la homaro en konado pri la vivo kaj malkovro de la sekreto de la vivo kaj la komencon de la epoko de sintezitaj proteinoj. Ĝi estas grava sukceso atingita en esplorado de teoria scienco por la ĉina popolo fare de sciencaj laborantoj de nia lando sub la gvido de la Partio, kiuj alte tenas la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong en la fortostreĉa grimpado de mondaj sciencaj montpintoj kaj en la granda marŝo por atingi kaj superi la progresintan sciencan nivelon de la mondo.

Tiu ĉi atingaĵo de esplorado jam estas ekspertizita de la Ekspertiza Komitato organizita de la Ŝtata Komitato de Sciencoj kaj Teknikoj. En sia unuanime aprobita ekspertiza atestilo la ŝtata ekspertiza komitato montris: Kontrolinte la projekton pri la artefarita sinteza insulino, la eksperimentan metodon, originalajn donitajn faktojn kaj logikan dedukton, oni konstatis, ke la arte sintezita produkto estas nenio alia ol kristala insulino de bovo. Tio ĉi estas kristala proteino kun biologia vivpovo, unuafoje artesintezita en la mondo, kaj ĝi estas ankaŭ la plej granda natura organika komponaĵo kun biologia vivpovo ĝis nun sukcese artesintezita. La eksperimentaj donitaj faktoj estas detalaj kaj fidindaj, kaj kompletaj estas la indicoj de analizado kaj determinado.

La ekspertiza komitato konstatis: La esploradon pri artefarado de insulino nia lando

entreprenis sur kompare malforta bazo de multpeptida kemio, sed rapide superis tiun de Usono kaj okcidenta Germanio kaj prenis la unuan lokon en la mondo. En tiu ĉi esplorado, kreivajn paŝojn oni faris en farado de la esplora projekto, projektado de la proceda linio de sintezado kaj disvolvado de teknikoj pri mikroizolado kaj mikroanalizado.

Proteino estas unu el la materiaj bazoj por la vivo, kaj ĉia vivaĵo ne povas ekzisti sen proteino kaj alia grava materio — nuklea acido. Tiel frue kiel antaŭ 90 jaroj, F. Engels jam montris: “Vivo estas la ekzista maniero de proteinaj korpoj”. Kaj li antaŭdiris: “Kemistoj povos ekfari proteinojn, se nur la komponado de proteino estos bone konata.” Tre multaj estas la specoj de proteino, tre kompleksaj estas iliaj strukturoj kaj estas malfacilege plene ilin koni. En la lastaj pli ol 30 jaroj, eksterlandaj sciencistoj faris longdaŭran esploron kaj nur en 1955 oni akiris klaran konon pri la kemia strukturo de speco de plej simpla proteino — insulino. Oni trovis, ke ĝi konsistas el heneikosapeptido (aŭ A-ĉeno el 21 diversaj aminoacidoj) kaj triakontapeptido (aŭ B-ĉeno el 30 diversaj aminoacidoj) interligitaj pere de du dusulfaj ligiloj. Por artefari insulinojn, multe pli da komplikaj laboroj devas esti faritaj, tial oni antaŭdiris en la brita gazeto “Naturo” en la jaro 1958: “Verŝajne oni ne sukcesos artefari insulinojn en konsiderinde longa tempo”.

Tamen ĝuste en tiu jaro, kaj kuraĝigate de la ĝenerala linio por socialisma konstruado de la Partio kaj instigate de la situacio de arde entuziasma antaŭensaltego tra la tuta lando, sciencaj laborantoj de nia lando la unuaj elmetis al si la sciencan temon pri sintezado de

insulino per artefara metodo. En la sekvinta jaro ili jam efektivigis disigadon kaj rekompomadon de la A- kaj B-ĉenoj de peptido konsistigantaj naturan insulidon kaj trovis ĝustan teknikan vojon por sintezi insulidon. En la kampo de tiu scienca esplorado kaj en ĉiuj stadioj de la esplorado, nia lando ĉiam sin trovis sur la unua loko. Ĉinio estas lando, kiu la unua sukcesis en la mondo en disigado kaj rekomponado de natura insulino; Ĉinio estas la unua en la mondo lando, kiu sukcesis akiri kristalan insulidon per kombinado de la sinteza B-ĉeno kun la natura A-ĉeno aŭ per kombinado de la sinteza A-ĉeno kun la natura B-ĉeno; kaj Ĉinio estas ankaŭ lando, kiu la unua sukcesis en la mondo akiri tute artesintezitan kristalan insulidon. En tiu ĉi esplorado, la ĉinaj sciencaj laborantoj faris nemalmultajn kreivajn paŝojn en metodoj kaj teknikoj.

Depost kiam nia lando sukcesis artefari tute artesintezitan insulidon je la 17-a de septembro, 1965, 57 aroj da sintezaj substancoj estis produktitaj, kaj ĉiuj de ili estas kun biologia vivpovo. Kvin el tiuj aroj estis repurigitaj por akiri kristalan insulidon, kiu estas sama kun tiu de natura insulino en kristala formo kaj biologia vivpovo. En komparo kun ĝis nun raportitaj rezultoj, similaj produktaĵoj de insulino akiritaj de Usono kaj okcidenta Germanio posedas tre malfortan vivpovon, kaj neniu kristalo estas akirita el la insulinoj.

La sukceso de artefarado de insulino havas gravan signifon ne nur en disvolvado de naturscienco, sed ankaŭ en filozofio. La demando pri la origino de vivo restas, dum multaj multaj jaroj, unu el la kernaj demandoj en la batalo inter materiismo kaj ideismo. La ideistoj asertas, ke la vivo "estas kreita de Dio", dum la materiistoj kredas, ke la vivo rezultiĝis el la movado, evoluado kaj disvolviĝado de senvivaj neorganikaj materioj dum centoj da milionoj da jaroj.


En 1828, germana sciencisto F. Wöhler la unua sukcesis artefari ureon, tiel transformis neorganikaĵon en organikaĵon, kaj pruvis unuafoje en la homa historio, ke ne ekzistas netranspasebla limo inter la organikaĵoj kaj neorganikaĵoj. Tio estis saltego en la homara konado

pri la fenomeno de vivo kaj forta bato al ideismo. Nun, la sukceso en artesintezado de insulino de la sciencaj laborantoj de nia lando aldonis unu fortan novan pruvon por la materiisma-dialektika teorio pri la origino de vivo. Tio estas alia granda antaŭenpaŝo de la homaro en la longa vojo de konado pri la sekreto de la vivo, kaj estas alia forta bato al ideismo.

Prezidanto Maŭ diris: "La popolamaso havas senliman kreivan povon," kaj "Sub la gvido de la Komunista Partio, se nur estas homoj, ĉiaj mirakloj estas fareblaj." La esplorado pri artesintezado de insulino estas farita ĝuste laŭ tiu ĉi brila ideo de Prezidanto Maŭ, oni rompis la malnovajn rutinojn en la pasinta esplorado, forĵetis la agmanieron de irado per unu kruro, t. e. malvigla esplorado pere de malmultaj specialistoj, kaj firmdecide aplikis la grandan komunisman kunlaboradon inter la gvidantoj, popolamaso kaj specialistoj, kun la amaso kiel sia apogo. Ĝuste kiel priskribis multaj sciencaj laborantoj: La artesintezita insulino estas kristalo de la kolektiva saĝo kaj produkto de la socialisma sistemo.

La sukcesa artesintezado de kristala insulino, unuafoje en la mondo plenumita de sciencaj laborantoj de nia lando, estas granda venko de la penso de Maŭ Zedong, kaj granda venko de la ĝenerala linio de socialisma konstruado de la Partio.

Artefarita kristala insulino (mikroskopa bildo)



Granda Disvolviĝo

de la Ĉina Foiro de

Eksportaj Komercaĵoj

LA Ĉina Foiro de Eksportaj Komercaĵoj estis iniciatita en la jaro 1957, kaj ĝi okazas en Kantono de Ĉinio, printempe kaj aŭtune de ĉiu jaro. Dum la jaroj de sia ekzistado, tiu ĉi foiro multe disvolviĝis en ĉiuj flankoj.

Pli ol 12,000 specoj de eksportaj komercaĵoj estis ekspoziciitaj en la 1-a Ĉina Foiro de Eksportaj Komercaĵoj, okazigita en Kantono, printempe de 1957, kaj ĝin vizitis pli ol 1,000 gastoj el pli ol 20 landoj kaj regionoj. Sed preskaŭ 30,000 specoj de komercaĵoj ekspoziciis en la 20-a Ĉina Foiro okazigita aŭtune de 1966, pli ol 6,000 gastoj el pli ol 60 landoj kaj regionoj de la kvin kontinentoj tra la tuta mondo ĝin partoprenis kaj la valoro de ĝiaj eksportitaj varoj pli ol 20-oble plimultiĝis kompare kun tiu de la 1-a Foiro.

Se la sukceso de la 1-a Ĉina Foiro de Eksportaj Komercaĵoj signifis fiaskon de la politiko "blokado" alprenita de la usona imperiismo, do hodiaŭ ni frakasis per eĉ pli fortaj faktoj la intrigon de la usona imperiismo kaj la moderna reviziismo en koluzio vane klopodi por izoli novan Ĉinion. La faktoj pravas, ke la ĉina popolo, armita per la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong, nek timas izoladon nek estas izolebla.

La senĉesa kresko de nia eksportado spegulas la impetegan disvolviĝon de nia nacia ekonomio. Pogrande eksportiĝas nun multaj varoj, kiujn Ĉinio ne povis produkti kaj devis importi. Sekve de la starigo de kompleta sistemo de ferŝtala me-

talurgia industrio, ĉiam pli grandiĝas la eksporta kvanto de diversaj ŝtalaj materialoj en la foiroj okazigitaj. En la pasinteco, la usona kaj brita imperiismo havis la monopolon de la ĉina petrolo merkato kaj forrabis de Ĉinio petrolan profiton de pli ol 3 mil milionoj da usonaj dolaroj dum pli ol 40 jaroj antaŭ la Liberiĝo. Tiu epoko nun jam finiĝis por ĉiam. Ĉinio jam povas produkti petrolon ne nur sufiĉan por sia bezono, sed ankaŭ superfluan por eksporto. La ĉina maŝinfabrika industrio, rapide disvolvita nur post la Liberiĝo, nun jam povas provizi grandakvante kompletojn de ekipaĵoj por eksporto. La ilmaŝinoj eksportitaj en 1966 plimultiĝis je pli ol 20 obloj kompare kun tiuj de la jaro 1957, kaj la nombro de specoj kreskis de 3-4 ĝis pli ol 80. Pli ol 40 landoj kaj regionoj importis niajn ilmaŝinojn.

Dum la lasta Foiro, la unuafoja eksporto de altprema hidrarga fluoreska lampo, kvarca-jodatumgustana lampo kaj longarka ksenona lampo vekis grandan atenton. Ni uzis nur mallongan tempon de kelkaj jaroj por sukcese provfari kaj pogrande produkti tiajn lumigilojn, debutintajn antaŭ nelonge en la mondo. En la komenca periodo post la Liberiĝo, la industrio de aparatoj de nia lando estis preskaŭ nula, sed nun nia industrio de aparatoj kaj elektraj ekipaĵoj ege disvolviĝis. Dum la Foiro en la aŭtuno de 1966, pli ol 300 specoj de tiaj produktaĵoj estis provizitaj. En la pasinteco, ni devis ĉiam importi alttensian porcelanon, kiu estas nemalhavebla altgrada izolilo

en industrio. Antaŭ kelkaj jaroj, kiam nia lando estis konstruanta elektro-porcelanan fabrikan, la sovetunia kliko de modernaj reviziismaj gvidantoj abrupte kaj perfide retiris la specialistojn kaj forportis la bluplanojn antaŭ ol la fabriko estis finkonstruita. Spite al tio, la laboristoj de nia lando venkis la malfacilojn en tekniko kaj manko de projekta materialo, sukcesis mem projekti kaj finkonstrui sian fabrikan dank' al propra saĝo. Nun ĝi jam povas produkti ne nur sufiĉan kvanton da porcelano enlande bezonata por ordinara industrio kaj alta tensio de 330,000 voltoj sed ankaŭ kvanton da tio por eksporto.

La abundaj produktaĵoj agrikulturaj kaj flank-okupaj montras al la vizitantoj la vivecan prosperon de niaj popolaj komunumoj en la kamparo. La vastaj amasoj de la komunumanoj en nia kamparo disvolvis amasan movadon de kreiva lernado kaj aplikado de la verkoj de Prezidanto Maŭ kaj la movadon de socialisma edukado. Tiuj movadoj multe altigis la socialisman konscion de la popolo. Ili produktas ĉiam pli multe por subteni la ekonomian konstruadon de la lando kaj la eksportadon. La eksporta kvanto de grenoj, oleoj kaj manĝaĵoj en 1966 kreskis je tri obloj kompare kun tiu de la 1-a Foiro, kaj la nombro de specoj plimultiĝis de centoj ĝis pli ol 2,500. Nun pli ol 1,000 komercaj unuoj en la mondo okupiĝas pri liverado de grenoj, oleoj kaj manĝaĵoj eksportataj de nia lando.

Tiel frue kiel antaŭ 17 jaroj, Prezidanto Maŭ jam diris en sia "Parolado ĉe la Prepara Konferenco de la Nova Politika Interkonsiliĝa Konferenco": **"Ĉina popolo volas konduki amikan kunlaboron kun diverslandaj popoloj de la mondo, restarigi kaj disvolvi la internacian komercon por favorigi la disvolvon de produktado kaj prosperigon de ekonomio."** Sekvante la instrukcion de Prezidanto Maŭ, nia popolo ĉiam firme teniĝas ĉe la politiko de egaleco, reciproka utilado kaj interŝanĝo de bezonaĵoj en la internacia komerco, kaj aktive disvolvas la komercon inter Ĉinio kaj ĉiuj partoj de la mondo. Nun nia lando jam starigis ekonomian kaj komercan interligon kun pli ol cent landoj kaj regionoj tra la mondo. Multaj amikoj el aziaj kaj afrikaj landoj diris en la Foiro: La senĉesa disvolviĝo kaj prosperiĝo de la Foiro prezentas venkon de la penso de Maŭ Zedong. La direktilo de sinapogo sur la propraj fortoj, elmetita de Prezidanto Maŭ, ne nur gvidas la ĉinan popolon en la socialisma ekonomia konstruado, sed ankaŭ montras la vojon al la popoloj de Azio kaj Afriko por disvolvado kaj prosperigo de la nacia ekonomio.

Tra komerco kaj aliaj vojoj, la imperiismo kaj la nova kaj malnova koloniismoj prirabadas la

landojn en Azio kaj Afriko kaj klopodas ĉiamaniere fari ilin fontoj de malkaraj krudaj materialoj kaj merkatoj por dumpingo. La nova socialisma Ĉinio starigis komercon bazitan sur la principo de egaleco, reciproka utilado kaj reciproka provizado de bezonaĵoj, akre kontraste al la komerca politiko de la imperiismo kaj la nova kaj malnova koloniismoj.

Dum sia partopreno al la 20-a Ĉina Foiro en Kantono, la estro de la Malia Komerca Delegacio, diris emocie: "Sennombraj faktoj komprenigis al la malia popolo, ke la socialisma Ĉinio estas lando en la mondo, kiu vere ne rigardas Malion kiel sian merkaton. Unuflanke Ĉinio vendas al ni varojn kiujn ni bezonas, aliflanke ĝi helpas nin konstrui fabrikojn, kiuj povas produkti tiajn varojn. Ĉinio helpis nin per alsenditaj teknikistoj en konstruo de nombro da fabrikoj, kaj nun helpas nin en konstruado de moderna ŝpinteksejo, kaj krome ĝi ankaŭ sendis agronomiajn specialistojn por helpi maliajn terkulturistojn en kulturado de tearboj kaj sukerkanoj. Ĉio ĉi estas plej bonaj pruvoj."

La nombro de la japanaj komercaj reprezentantoj partoprenintaj la 20-an Ĉinan Foiro atingis pli ol 700 kaj rompis la rekordojn. Japanaj amikoj montris: Ne sukcesos la intrigo por subfosi la amikan komercadon inter Ĉinio kaj Japanio, kombinita de la gvidantoj de la antaŭa Asocio por Akcelado de la Japana-Ĉina Komercado, instigitaj de la modernaj reviziistoj kaj iliaj sekvantoj. La japanaj amikaj komercistoj nepre devas unuigi ĉirkaŭ la nova organizo por akcelado de la amika komercado inter Japanio kaj Ĉinio, disvolvi la amikan komercadon inter la du landoj, progresigi la amikecon inter ili kaj batali por frua restarigo de diplomacia rilato inter la du landoj, laŭ la tri politikaj principoj (nome: 1. ĉesigi praktikadon de la malamikema politiko; 2. ne partopreni la intrigon de fabrikado de "du Ĉinioj"; 3. ne malhelpi la restarigon de normala rilato inter Ĉinio kaj Japanio), la tri komercaj principoj (t. e. 1. registaraj decidoj; 2. popolaj kontraktoj; 3. favoro al apartuloj) kaj la principo de nedividebleco de politiko kaj ekonomio.

Depost la iniciato de la Ĉina Foiro, kun ĝia disvolviĝo, grandskale kreskis ankaŭ la komercado kun Ĉinio fare de la importistoj kaj eksportistoj de la eŭropaj landoj Francio, Britio, Italio, okcidenta Germanio, Aŭstrio, Svedio, Danlando, Norvegio, Svisio, Finnlando k. a. Senĉese disvolviĝas ankaŭ la komerca interligo kun la Foiro fare de kanadaj, meksikaj kaj argentinaj komercistoj el Norda Ameriko kaj Latinameriko kaj aŭstraliaj kaj novzelandaj komercistoj el Oceanio.




Inaŭguro de la Ekspozicio de Kontraŭimperiismaj Karikaturaj de Aziaj kaj Afrikaj Popoloj.

“Ekspozicio de Kontraŭimperiismaj Karikaturaj de Aziaj kaj Afrikaj Popoloj” en Pekino

LA “Ekspozicio de Kontraŭimperiismaj Karikaturaj de Aziaj kaj Afrikaj Popoloj”, kiu spegulis la kontraŭimperiismajn revoluciajn batalojn de la aziaj kaj afrikaj popoloj okazis en Pekino, de la 24-a de nov., 1966 ĝis la 4-a de jan., 1967.

En la ekspozicio, kiun aranĝis la sekretario de la

Azia kaj Afrika Ĵurnalista Asocio, estis montrataj sume pli ol 180 karikaturaj, liveritaj de revoluciaj karikaturistoj kaj ĵurnalistoj el 22 landoj kaj regionoj en Azio kaj Afriko. Ĝi estas ekspozicio, kiu multe kreskigis batalvolon de la revoluciaj popoloj de Azio kaj Afriko kaj plene faligis la arogantecon de la malamiko.



Usono estas preta por "Paca Intertraktado".
 Nguyen Bich de la Demokrata Respubliko de Vjetnamio

Kune kun diverslandaj popoloj, la revoluciaj karikaturoj kaj ĵurnalistoj de Azio kaj Afriko profunde komprenis post revolucia praktikado, ke la penso de Maŭ Zedong estas la plej potenca ideologia armilo por la revoluciaj popoloj de Azio kaj Afriko en iliaj revoluciaj bataloj. Ili senkompare amas Prezidanton Maŭ, kaj varme prikantas en siaj verkoj la penson de Maŭ Zedong kaj la grandan proletan kulturan revolucion venke kondukatan sub lia persona gvidado. Kaj ili ankaŭ uzas sian plumon kiel armilon, por akre kaj konvinke malkovri la papertigran esencon de la usona imperiismo kaj diverslandaj reakciuloj, kiuj estas fortaj ekstere sed sensukaj interne, malkaŝi la senhontan vizaĝon de sovetaj reviziistoj, kiuj perfidas la revolucion kaj ludas la rolon de komplicoj de la usona imperiismo, kaj fervore prikanti la unuiĝon inter la aziaj kaj afrikaj popoloj, la leviĝon de la revoluciaj bataloj de aziaj kaj afrikaj popoloj kaj la grandajn venkojn de ili akiritajn. La ekspozicio ĉi tie okazinta estas la unua revuado de kontraŭimperiismaj karikaturoj de Azio kaj Afriko kaj estas grava evento en la politika vivo de aziaj kaj afrikaj popoloj.


Tiu grandskala ekspozicio havis lokon en la Ĉina Belarta Domo. La tutkorpa statuo de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ majeste staras en la centra halo de la ekspoziciejo. Ambaŭflanke sur la muroj pendas grandaj ruĝaj rubandoj kun surskriboj: "Sub la gvido de Prezidanto Maŭ, la granda instruanto, granda gvidanto, granda ĉefkomandanto kaj granda direktilisto, la ĉina popolo firme subtenas la kontraŭimperiismajn revoluciajn batalojn de la tutmondaj popoloj!" "Prezidanto Maŭ estas la ruĝa suno en la koro de la monda popolo; la tutmonda revolucia popolo varme amas la penson de Maŭ Zedong!" Sur la fundo de la halo troviĝas la vortoj de Prezidanto Maŭ: "La popolo de la tuta mondo unuiĝu kaj venku la usonajn agresantojn kaj ĉiujn iliajn lakeojn! La popolo de la tuta mondo havu kuraĝon, aŭdacu batali, timu nenian malfacilojn kaj marŝu antaŭen, unuj

sekvante aliajn; tiam, la tuta mondo certe apartenos al la popolo. Ĉiuj demonoj estos senescepte ekstermitaj."

Dum la 40 tagoj de la ekspozado vizitis ĝin 1,100,000 homoj, el kiuj estis ruĝaj gvardianoj, diversprofesiaj revoluciaj amasoj de Pekino kaj diversaj lokoj de la tuta lando, kaj fremdlandaj amikoj el pli ol 40 landoj kaj regionoj, nun restantaj en Pekino. En la ekspozicio ili vidis kiel diverslandaj popoloj mastras la penson de Maŭ Zedong, kaj laŭdis ke la ekspozicio spegulas la luktojn kaj batalan unuiĝon de la ĉina popolo kaj diverslandaj popoloj kontraŭ la komuna malamiko — la usona imperiismo kaj kontraŭ la moderna reviziismo. La ekspozicio plifortigis al ili la memfidon por batali ĝisfine pro la proleta revolucia afero. Ili surskribis siajn impresojn sur notfolioj pri ĝi kaj siajn varmajn ĝojkriojn en malsamaj lingvoj: "Vivu la granda gvidanto Prezidanto Maŭ! Vivu la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong!"

Li volas, sed ne povas.

Van Binh de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio



1,050,000 Malamikoj Ekstermitaj de la Armeo kaj Popolo de Suda Vjetnamio en 6 Jaroj

EKDE la jaro 1961 ĝis la fino de 1966, la heroaj armeo kaj popolo de suda Vjetnamio ekstermis aŭ frakasis malamikajn trupojn sume el 1,050,000 personoj, inter kiuj sin trovis pli ol 130,597 el la usona agresa armeo kaj komplete frakasis 108 malamikajn batalionojn, inter kiuj sin trovis 37 infanteriaj kaj kirasitaj batalionoj usonaj.

En la trijara gerila milito de 1961 ĝis 1963, disvolvita por malsukcesigi la Staley-Taylor-Planon, la armeo kaj popolo de suda Vjetnamio ekstermis aŭ frakasis malamikajn trupojn sume el 250,000 puparmeanoj kaj mortigis aŭ vundis pli ol 1,500 usonajn "konsilistojn".

La armeo kaj popolo de suda Vjetnamio en 1964 kaj 1965 denove malsukcesigis la Planon de "Pacigo sur ĉefaj punktoj" de la usona imperiismo, kaj ekstermis aŭ frakasis malamikajn


trupojn sume el proksimume 460,000 personoj, el kiuj pli ol 21,300 estis usonaj agresantoj.

Fronte al la danĝero de ĝisfunda disfalo de la pupa armeo kaj pupa reĝimo, la usona imperiismo komencis novan militan aventuron ekde 1965, grandnombre sendis siajn proprajn trupojn al suda Vjetnamio por rekte agresi kaj pligrandigi la agresan militon kontraŭ Vjetnamio en "lokan militon", por vane savi sin el la sorto de malvenko. Tamen, la serio da atakoj, kiujn ili faris, ĉiuj renkontis pezajn kaj mizerajn malsukcesojn. La batalrezulto de la ses jaroj montris, ke la liberigaj armitaj fortoj de suda Vjetnamio jam senĉese kreskis kaj potenciĝis dum la batalado, ĉiam tenis en la manoj la povon de iniciato en la batalejo, kaj plue disvolvis la gerilan militon, povante ne nur defendi la liberigitajn regionojn, sed ankaŭ plifortigi atakojn al la malamiko en la okupitaj regionoj.

Usona agresanto deprimita kaj malespera.



Lodge, la usona "ambasadoro" al Sajgono gapas al la mineksplodigita domo de la usona armeo





Heroaj batalantoj de la Liberiga Armeo de Suda Vjetnamio triumfe revenas.

Usonaj agresantoj preĝas a Dio, ke li protektu ilin.



“Dio Gardu min”

En letero sendita de la familio de iu usona soldato en suda Vjetnamio estas skribite: “Ni ĉiuj esperas, ke vi ĉiel konservos vian vivon kaj penu plej rapide forlasi sudan Vjetnamion por reveni al la hejmo.” En la respondo la soldato skribis: “. . .mi ne scias, kiam finiĝos tiu ĉi milito. Nu, lasu ĉion al la sorto! Okaze de danĝero, Dio gardu min!”



Per medalo honoritaj "usonano-ekstermaj bravuloj" de iu trupo de la Liberiga Armeo de Suda Vjetnamio

Brilaj Atingoj de la Armeo kaj Popolo de Suda Vjetnamio en 1966

<p>370,000 malamikoj estis mortigitaj, vunditaj aŭ kaptitaj, inkluzive de 108,000 usonaj agresantoj</p>	<p>2,130 malamikaj aviadiloj estis faligitaj aŭ detruitaj per bombardo</p>	<p>97 malamikaj militaj ŝipoj kaj boatoj estis subakvigitaj</p>
<p>3,300 malamikaj militaj veturiloj estis detruitaj</p>	<p>742 pontoj de la malamiko estis detruitaj per mino</p>	<p>43 lokomotivoj kaj 217 vagonoj de la malamiko estis detruitaj per mino</p>

Kanto pri Oŭjang Haj

9-a Ĉapitro : Sturmo kontraŭ Flamanta Fajrego (Daŭrigo)

ALTA NORMO

La kamaradoj de la tria roto kaj aliaj taĉmentoj elpemis kelkan tempon de sia trejnado kaj venis por subteni la akvokonservan konstruadon, en kiu ili sin ekokupis denove per vektoj kaj korboj. Sub la suno en la tago kaj sub la inkandeska gaslumo en la nokto ili elpavimis ebenan kaj bonordan ŝoseon en nur kvin tagoj, kiu kondukis de la vojforko ĝis la granda digo. Nun restis iom da laboro laststadia. Iuj plantis arbojn ambaŭflanke de la ŝoseo kaj aliaj tegis ĝin per tavolo da sableroj. Oŭjang Haj gvidis la sepan subplotonon konstrui drenan tunelon.

Dum tiuj ĉi kelkaj tagoj Gaŭ Jiĝong trovis, ke Oŭjang Haj estis en vigla humoro kiam li portis teron aŭ ŝtonojn, sed li sulkigis siajn brovojn kiam li fosis teron per ŝovelilo aŭ pioĉo. Li pensis, ke eble la subplotonestro estis iel malsana. Se ne estus tiel, tia fera heroo kia li, malofte sulkigis sian frunton. Gaŭ Jiĝong kun atento observis kelkfoje, tamen li povis malkaŝi nenion. Estis strange, ke kion ajn la subplotonestro faris, li ĉiam portis laborgantojn, kaj ne demetis ilin eĉ dum manĝado. Ree Gaŭ Jiĝong pensis: “En la pasinteco li neniam portis gantojn dum laboro, ĉar por li ili estas ĝenaĵo. Kial li nun ŝanĝiĝis? Aha! io sekreta en la gantoj.”

Gaŭ Jiĝong raportis tion al Vej Vujue. Juna Vej diris, ke ankaŭ li rimarkis tiun kontraŭkutiman okazon kaj turnis sian atenton al tio pli ol unu tagon.

“Laŭ mia opinio,” diris Gaŭ Jiĝong, “certe estas io ne en ordo en la gantoj de la subplotonestro. Alie, kial li ne demetis ilin de la mateno ĝis la vespero!”

“Kio povas esti en la gantoj?” demandis juna Vej exploreme.

“Eble, liaj manoj vundiĝis.”

“Neeble,” diris Vej Vujue kun certeco. “Lasttempe mi iris demandi ĉiutage al la sanitaristo, sed tiu diris, ke subplotonestro absolute neniam turnis sin al li kun peto por kuraco.”

Aŭskultante apude, Liu Janŝeng iom perdis sian paciencon. Li diris:

“Ĉu estas utile por vi diveni vane? Se vi volas scii la guston de piro, vi devas ŝanĝi la piron.

Deprenu la gantojn de la subplotonestro post momento, kaj ni informiĝos pri ĉio!”

Jam farinte tian provon, Gaŭ Jiĝong diris: “Sed li ne volis depreni ilin. Posttagmeze en mardo mi petis lin, ke...”

“Se vortoj ne efikas, ni agu per forto,” Liu Janŝeng murmure flustris al ili en la orelojn. “. . .Mi ne kredas, ke ni ne povos subigi lin!”

Kiam la tri batalamikoj fininterkonsiliĝis, ili eksplodis per rido.

Estis klarionita la laborĉesigo por la tago. Juna Vej kolektis al si ĉiujn kaj flustris al ili. Post rigardserĉado ili trovis, ke Oŭjang Haj malaperis. La kamaradoj vokis lin en ĉiu direkto, sed neniam respondo estis.

“Ho, estas strange! Ĵus mi vidis lin ĉi tie,” diris Liu Janŝeng.

“Kien li iris?” la kamaradoj demandis unu la alian.

Subite ili sentis, ke ŝajne estas bruo subtere. Post momento Oŭjang Haj rampis el la tunelo. Ĉe vido de lia aspekto ĉiuj eksplodadis per ridego, ne povante rektigi la talion ĝis agaciĝis la dentradikoj.

Oŭjang Haj estis nuda ĝis la talio. Escepte de liaj okuloj, li estis kovrita per ŝlimo de la kapo ĝis la piedoj. La haroj kungluitaj de koto hirtiĝis kvazaŭ harhava lagenaria ĉerpilo metita sur la kapo. Li senĉese sputis la koton el la buŝo, kaj parolis konsternite al la kamaradoj.

“Pro kio vi ridas? Pf, diru al mi. Pf, pf...”

Vidinte, ke li ankoraŭ estis en konfuzo, ĉiuj ridegis des pli forte. Juna Liu levis duonsitelon da akvo kaj verŝis ĝin rekte sur lian kapon.

“Vi prenu duŝon!”

“Brave, juna Liu, atendu, mi donos al vi baton,” kriis Oŭjang Haj evitante flanken. Pura, glacia akvo surverŝiĝis sur lian korpon, de kiu defluis malpura kotakvo. Li ŝerce diris: “Fi. . .tiu ĉi ‘kalcia glikozo’ estas ja bongusta, sed nur la dentoj ĝin ne povas toleri. Pf pf. . . Kial vi ridas!”

Juna Liu diris ŝerce: “Subplotonestro, ni ridas pri vi. Oni ofte diris, ke tiu aŭ alia similas al kota simio. Nur hodiaŭ mi efektive vidas tian.”

“Nun serioze,” Oŭjang Haj hastis gargari al si la buŝon. “Mi jam faris kontrolon al la tunelo. La tuboj ĝuste juntiĝis unu al la alia, kaj la deklivo

estas laŭnorma. Mi garantias, ke la tunelo ne disfalos eĉ se sur ĝi pasas kolosaj maŝinoj centojn aŭ milojn da tunoj pezaj. Morgaŭ ni alportu iom da cemento kaj tegu ĝin, kaj la laboro estos komplete plenumita.”

“Ĉifoje ni sepa subplotono devas esti honorita per laŭdo kaj restarigi nian prestiĝon,” juna Liu diris kun ĝojo. “Ĉar ni superplenumis la taskon.”

Oŭjang Haj demandis lin, kion signifas “superplenumo”. Juna Liu kalkulis per fingroj:

“Jen la vojo, kiun ni rekonstruis kune kun la aliaj. Ankaŭ je la flankaj produktoj ni ne estiĝis. Vi gvidis nin fari dudek vektojn kaj unu vaporumilon por la roto. Krome ni konstruis tiun ĉi tunelon per ŝparita tempo. Ĉu tio ne estas superplenumo?”

“Juna Liu, via normo estas tro malalta,” diris Oŭjang Haj. “Servi al la popolo estas nia devo, do ni devas plenumi nian taskon. Ni estu bonaj batalantoj de Prezidanto Maŭ. La ‘plenumo’ devas esti la fina triumfo de komunismo. Ĉu vi pensas tion ‘superplenumo’, ke nur iom ni faris?”

“Sed. . . sed la normo ĉe vi estas tro alta. Laŭ via opinio, ni ne komplete plenumos nian taskon antaŭ ol efektiviĝos la fina triumfo de komunismo?”

“Memkompreneble. Ĝuste pro tio ni devas batali por komunismo ĝis la fino. Nun ni nur ‘plejparte’ plenumis tiun ĉi konkretan taskon.” Aldone Oŭjang Haj demandis ĉiujn. “Vi diru, ĉu prave?”

“Prave! Ni plejparte plenumis la taskon,” unuvoĉe respondis ĉiuj.

“Mi ne konsentas. Plejparte plenumi taskon signifas, ke ĝi ne estas bone plenumita. Tamen ni ne pridisputas tion hodiaŭ,” diris Liu Janŝeng, kaj li etendis sian manon. “Por gratuli nian sukcesplenan plenumon de la tasko, subplotonestro, ni manpremu.”

“Kamaradoj, tre bone laboris nia juna Liu en tiuj ĉi tagoj. Dum juntado de tuboj, li kuŝmaniere restis en la tunelo dum tri-kvar sinsekvaj horoj. Li ja meritas esti la posteulo de veterana revoluciulo!” Oŭjang Haj diris al ĉiuj etendante sian gantitan manon.

“Deprenu! Ne estas ĝentile premi manojn en gantoj,” diris Gaŭ Jiĝong.

Rimarkinte lian intencon, Oŭjang Haj haste ŝovis siajn manojn en la poŝojn kaj diris:

“Kion vi volas?”

“Nenion alian,” diris Gaŭ Jiĝong. “Bonvolu demeti vian ganton, kaj ni premu al ni la manojn.”

“Ho, kiel aroganta vi estas,” Oŭjang Haj tuj kuris flanken. “De kie venas tia postulemo pri etiketo.”

Juna Liu palpebrumis al la aliaj, kaj laŭ fiksita plano ili ĉiuj tuj svarmis al Oŭjang Haj, kaj faligis lin teren per puŝoj, kriante unuvoĉe:

“Ĉu vi deprenos la gantojn aŭ ne?”

“Mi. . . mi ja ne deprenos,” Oŭjang Haj kuŝis sur la tero kun siaj ambaŭ manoj firme alkroĉitaj en la poŝoj.

“Bone, vi ja estas kapabla. Nu, tiklu lin!” juna Liu alvokis, kaj kvin-ses paroj da manoj etendis al la akselo kaj talio de Oŭjang Haj kaj ekgratis.

“Aj, Aj! . . .” Oŭjang Haj ruliĝis tien kaj ĉi tien, “Mi. . . mi ne timas, mi ja ne deprenos. Aj. . .”

“For la sensencaĵon! Ni agu per forto,” kriis juna Liu. Kelkaj kamaradoj kune streĉis sian forton kaj tiris la manojn de Oŭjang Haj el liaj poŝoj.

Veĵ Vujue vidis, ke boteleto falis el la poŝo de Oŭjang Haj. Li levis ĝin kaj legis la etiketon: “Universala Oleo, speciala kuracilo por brulvundo kaj brogvundo; pusoforiga kaj karnokreskiga. . .”

“Oho, fine trovita, ke liaj manoj vundiĝis. . .” Veĵ Vujue rapide detenis la aliajn kaj kriis:

“Ne tuŝu la manojn de subplotonestro, ne tuŝu!”

Juna Liu kaj kelkaj aliaj kamaradoj, kiuj kaptis la gantojn, konsterniĝis.

“Subplotonestro,” Veĵ Vujue diris tenante la flakonon de ‘Universala Oleo’. “Ne plu kaŝebla estas la sekreto. Vi deprenu mem la gantojn kaj montru la manojn al ni ĉiuj.”

“Bone, mi deprenos, sed vi ne disbabilu,” diris Oŭjang Haj, malrapide demetante la gantojn. “Jen rigardu.”

La paro da kalaj manoj nun aliformiĝis. La veziketoj jam malaperis, sed la ruĝa, ĵus elkreskinta, delikata karno kelkloke sur la polmoj kaj fingroj estis tiel glata, ke eĉ ne aperis la polmfaltoj.

“Aj,” Liu Janŝeng tute ne imagis, ke ilia ŝerco kondukis al tia rezulto. Milde li subtenis ambaŭ manojn de Oŭjang Haj kaj diris:

“Subplotonestro, okazis, ke vi laboris kun vundo dum tiuj ĉi tagoj. Kial vi ne diris tion pli frue?”

“Estas nenio,” Oŭjang Haj retiris siajn manojn kaj elorbitigis al li siajn okulojn. “Ĉio estas en ordo. Ĉu ne estas vere, ke nova karno elkreskis? Tio estas ‘la nova substituas la malnovan’. Ĉu ne, juna Gaŭ?” Fininte sian parolon, li intence kunfrapis dufoje siajn manojn.

“Subplotonestro,” Gaŭ Jiĝong haltigis lin. “Kion vi faris?”

“Kial vi demandis pri tio?” Oŭjang Haj etendis siajn manojn antaŭ la kamaradojn. “Kiel ajn, mi jam resaniĝas.”

En Konstruado**SPECIALA PRESINKO
PLIPRODUKTATA POR PRESI
VERKOJN DE PREZIDANTO MAŬ**

La revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de Tiangin-a Presinka Fabriko rigardas kiel sian gloran politikan taskon la produktadon de la speciala presinko por provizi pli ol dudek provincojn kaj urbegojn de la tuta lando en ilia presado de la verkoj kaj portretoj de Prezidanto Maŭ. Ili klopodis kun granda fervoro por reformi la malnovan komplikitan teknikon de produkto de prusa bluo uzata en farado de presinko. Laŭ la malnova produkta procedo oni povis produkti ĉiutage tri fojojn. La nova ebligas produkti ok fojojn, ĝi ne nur reduktis la konsumon de la materialo, sed garantias ankaŭ la kvaliton de produktaĵoj.

**PLIPRODUKTO DE
LA ŜENJANG-A FABRIKO
DE NORMIGITAJ PARTOJ**

Sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ zorgi pri la tuto, por atenti interesojn de la tuto, fari bonan servon de "ŝraŭbo" al la revolucio kaj preni tion kiel sian gloron, la revoluciaj oficistoj kaj laboristoj de la Ŝenjang-a Fabriko de Normigitaj Partoj kreis kondiĉojn por frataj fabrikoj de la lando en ilia plenumo de la ŝtataj planoj. En 1966, ĝia totala produkta kvanto multe kreskis kaj la kvalito de produktaĵoj rimarkinde altiĝis.

Ŝenjang-a Fabriko de Normigitaj Partoj estas unu el la pli grandaj tiuspecaj fabrikoj. Ĉiujare ĝi produktas centmilionojn da ŝraŭboj kaj aliaj maŝinpartoj por uzo de pli ol du mil frataj fabrikoj de la tuta lando.

**ŜANDONG-AJ ŜPINTEKSISTOJ
ŜPARAS KOTONON**

Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ pri strikta praktikado de ŝparemo, la vastaj amasoj de revoluciaj laboristoj kaj oficistoj sur la fronto de ŝpinteksa industrio en Ŝandong profunden disvolvis la aktivadon pri ekonomia uzo de kotono kaj rikoltis grandan sukceson. De jan. ĝis nov. 1966, ili ŝparis kotonon sume je pli ol 1,200,000 ĝinoj. Uzante fadenojn el tiom da kotono oni povas elteksi pli ol 10,000,000 futojn da ŝtofo, kiu sufiĉas por fari po kompleto da vestoj por 650,000 personoj.

Vej Vujue plendis: "Vi ja devis antaŭe sciigi tion al ni. Mi estas stulta. Antaŭ kelkaj tagoj mi sentis tion, sed mi ne pensis ĝin grava. Mi tute ne devis. . . absolute ne devis lasi vin labori kune kun ni tiel longe! Se tio estus trovita pli frue, mi estus povinta. . ."

"Vi estus povinta flankenigi min por ripozo. Ĉu ne estas vere, ke nun la ŝoseo estis konstruita kaj miaj manoj ankaŭ resaniĝis? Kaj la laboro plenumita kaj la sano regajnitaj."

"Mi iros al la anstataŭanta vicdirektanto por raportoj," diris Vej Vujue.

"Ne," Oŭjang Haj detenis lin, "Raportoj ne permesite."

"Kial ne?"

"Vicsubplotonestro," Oŭjang Haj petegis lin. "Jam okazis ne malmulte da akcidentoj en nia subploton. Se vi raportus. . ."

"Strange," juna Liu interrompis lin. "Ĉu tio estas kalkulebla kiel akcidento, ke vi laboris kun vunditaj manoj?"

Oŭjang Haj diris ŝajnigante sin serioza, "Kompreneble tio estas akcidento. Unu el la kondiĉoj por la kvin bonoj estas: Bona plenumo de korpa ekzerco. Se vi raportos, mi ne povos esti pritaksita kiel batalanto kun kvin bonoj, nek porti medalon de kvin bonoj ĉe jarfino, kiu do respondecos pri tio? Jen estas grava afero," finparolinte li mem ne povis deteni sin de rido.

Ne forlasi la fronton pro malgrava vundiĝo — tio estas kvalito de batalanto kun kvin bonoj. La aliaj kamaradoj sciis, ke subplotonestro faris ŝercon, kaj kelkaj ankaŭ ridis kune kun li. En tiu ĉi momento Gaŭ Jiĝong ne ridis. Li rememoris, ke kiam li iris rekonstrui ŝoseon tuj post sia alveno al la tria roto, Oŭjang Haj diris: "Se nur la batalo postulas, oni rampas antaŭen eĉ kun rompigitaj kruroj, neparolante jam pri tio, ke sur la plandoj aperas veziketoj pro longa irado. Ankaŭ tio estas scienco — scienco de revolucio." Mallaŭte li diris al si mem:

"Ho, subplotonestro! Vi efektive agas kiel vi diras. En via persono mi vere komprenis, ke firma volo de homo multe superas la tiel nomatan 'fiziologian limon'. Ni povas plenumi la taskon tiel, kiel la popolo bezonas, kaj tio estas la limo de la firma volo de komunisto. Tiuj 'sciencaj argumentoj', kiujn mi absurde babilaĉis en la pasinteco, jam estas frakasitaj de via praktika agado de la lastaj jaroj. . ." Li sentis ion akra interne de siaj palpebroj, kaj li rapide deturnis sian vizaĝon. . .


Kanono el Liĉi-arba Trunko

En la jaro 1927, kamarado Maŭ Zedong fondis la unuan revolucionan bazlokon ĉe Ginggang-montaro. Sub ĝia influo, ankaŭ la popolo sur Hajnan-insulo levigis por konduki revolucion sub la gvido de la Komunista Partio. Laboristoj kaj kamparanoj organiziĝis en Ruĝan Gvardion kaj batalis per glavoj kaj lancoj ŝultro-ĉe-ŝultre kun la Ruĝa Armeo.

La membroj de la Ruĝa Gvardio forte deziris havigi al si kanonon por potencigi sian revolucion imponcon. Iu ĉarpentisto kun familia nomo Han el Venĉang-gubernio estis kompartiano kaj decidis fari kanonon por la Ruĝa Gvardio. Kiel materialon, li prenis trunkon de liĉi*-arbo, kies ligno estas plej solida en Hajnan-insulo. Helpate de membroj de la Ruĝa Gvardio li sukcesis finfine elfari lignan kanonon post longa cerbumado. Ĉiufoje oni povas ŝargi la kanonon per 1 kg. da feraj buletoj kaj pli ol 1.5 kg. da pulvo kaj pafi per bruligo de aldonita meĉo. Ĝiaj pafoj estis potencaj. Membroj de la Ruĝa Gvardio faris kun

ĝi plurajn batalojn en akordo kun la Ruĝa Armeo kaj mortigis aŭ vundis multajn malamikojn. Sekve de tio disvastiĝis la rakonto pri la kanon-farado de la ĉarpentisto. Hajnanaj popolanoj intime ĝin nomas "liĉia kanono".

**Liĉio = Nephelium Litchi Camb.*



Karaj legantoj:

Ni ĝoje sciigas vin ke sub la gvido de la granda penso de Maŭ Zedong kaj la stimulo de la senprecedenca, granda proleta kultura revolucio kaj en aktiva respondo al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ pri teno de revolucio kaj stimulo de produkto, ni decidis aperigi nian gazeton ĉiumonate ekde la unua numero de 1967. Tio ebligas ke la raportoj de nia gazeto fariĝos pli riĉaj kaj pli aktualaj. Ni elkore atendas vian plenan subtenon.

El Popola Ĉinio

A L L S.

Kara amiko,

Kun ĝojo ni ricevis vian leteron datitan je la 6-a de novembro, 1966, kaj eksciis, ke vi havas grandan intereson kaj zorgon pri la granda proleta kultura revolucio nun vigle disvolviĝanta en nia lando. Ni tre volonte respondos al viaj demandoj. Tamen en nia respondo ni povas nur koncize konigi vin pri la granda signifo de tiu ĉi granda revolucio kaj koncernaj principoj kaj politikoj. Bonvolu skribi al ni, se vi trovos ankoraŭ malklarigajn punktojn.

Sub la saĝa gvidado de la granda gvidanto kamarado Maŭ Zedong kaj post malfacilaj bataloj dum 28 jaroj, la ĉina popolo faligis en Ĉinio la enlandan reakciaron de Ĉiang Kajŝek kaj eksterlandajn agresajn fortojn de imperiismo estrata de la usona imperiismo, kaj fine fondis la Ĉinan Popolan Respublikon en la 1-a de oktobro, 1949. Kvankam la reakcia reĝimo jam estis renversita kaj la posedsistemo de bienularo kaj burĝaro abolita, tamen la bienulaj kaj burĝaj reakciuloj ne estas kontentaj pri sia malvenko, kaj ili ĉiurimede provas sin restarigi. Antaŭ ĉio, ili metis sian esperon sur la ideologian kampon. Ili koruptas la popolamasojn per la malnovaj ideoj, malnova kulturo, malnovaj moroj kaj malnova kutimo de ekspluatataj klasoj por prepari la publikan opinion al ilia politika restariĝo. Ĝuste kiel Lenin diris, ili nepre "sin ĵetos en la batalon por restarigi sian forprenitan 'paradizon' per mirinda energio, furioza pasio kaj centoble kreskinta malamo".

Antaŭ dek jaroj kamarado Maŭ Zedong saĝe montris: "La klasbatalo inter la proletaro kaj la burĝaro, la klasbatalo inter diversaj

politikaj fortoj kaj la klasbatalo inter la proletaro kaj la burĝaro en ideologia kampo estas ankoraŭ longdaŭraj, zigzagaj kaj iam eĉ tre akraj. La proletaro klopodas transformi la mondon laŭ sia mondkoncepto, ankaŭ la burĝaro klopodas tion fari laŭ la sia. En tiu ĉi rilato, restas ankoraŭ nesolvita la problemo — kiu venkos kiun — inter socialismo kaj kapitalismo." Nun vi eble povas kompreni, pro kio ni bezonas konduki tiun ĉi grandan ideologian revolucion post la kapto de la regpotenco fare de la proletaro. La granda proleta kultura revolucio estas granda ideologia revolucio post la kapto de la regpotenco. La celo de tiu ĉi movado estas batali kontraŭ tiuj personoj, kiuj enŝteliĝis en la Partion kaj iras la kapitalisman vojon, ĝis ilia kolapsiĝo, kritiki la reakciajn burĝajn akademian "aŭtoritatulojn", kritiki la ideologion de la burĝaro kaj ĉiuj aliaj ekspluatataj klasoj kaj transformi edukadon, literaturon kaj arton kaj ĉiujn aliajn partojn de la superstrukturo, kiuj ne konvenas al la socialisma ekonomia bazo, por firmigi kaj disvolvi la socialisman sistemon.

La historiaj spertoj de la internacia proletaro montras al ni, ke sen granda revolucio en ideologio, la socialisma sistemo ne povos esti firmigita, tiam okazos la kapitalisma restariĝo, kaj socialismo fariĝos reviziismo.

Kiel supre jam menciite, la ĉefa objekto de la movado estas plenumo da potenctenantoj en la Partio, kiuj iras la kapitalisman vojon. Kial en la Partio sin trovas tiaj potenctenantoj? Kial la movado prenas tiujn personojn kiel la ĉefan objekton? La kaŭzo kuŝas en tio: Niaj partio, registaro, armeo kaj

rondoj de kulturo, literaturo kaj arto ne vivas en vakuo. La akra klasbatalo en- kaj ekster-landa neeviteble speguliĝas en la Partion kaj registaron. La enŝteliĝo de plenumo da reprezentantaj personoj de la burĝaro en la Partion, registaron, armeon kaj kulturajn rondojn ne estas io mirinda. Tio estas nepraleĝo de klasbatalo. Niaj klasaj malamikoj bone scias, ke la fortikaĵo povas esti konkerita plej facile de interne. Tial ili ĉiam kaj ĉiurimede aplikas la metodon "ellogi aŭ enŝteliĝi" por eniĝi inter niaj vicoj kaj trovi agentojn en nia partio. Tiuj reprezentantaj personoj de la burĝaro enŝteliĝintaj en la Partion estas plej danĝeraj homoj. Ili tenas la "ruĝan standardon" por oponi la ruĝan standardon, kaj vestas sin per la mantelo de marksism-leninismo kaj la penso de Maŭ Zedong por oponi ilin. Utiligante povon en siaj manoj, ili lasis diablojn kaj demonojn elpaŝi amase kaj libere unuflanke, kaj subpremis la revoluciajn agojn de proletaj maldekstruloj kaj praktikis kontraŭ ili la burĝan diktaturon aliflanke. Se ni ne faligus ilin, povus esti, ke kiel Ĥruŝĉov-reviziisma kliko de Sovetunio ili uzurpos la gvidantecon de la Partio, armeo kaj registaro, pere de la povo en iliaj manoj, efektiviĝos en tiu tago kapitalisman restariĝon kaj enterigos la revolucian frukton de la popolo, akiritan kontraŭ sango kaj ofero.

Tiu ĉi granda proleta kultura revolucio estas iniciatita kaj gvidata persone de kamarado Maŭ Zedong. Li senlime fidus kaj sin apogas al la popolamaso, kuraĝas senrezerve mobilizi ĝin kaj estimas ĝian iniciativon. La "Decido de la Centra Komitato de Komunista Partio de Ĉinio Koncerne al la Granda Prole-

ta Kultura Revolucio" ellaborita sub la persona prezido de kamarado Maŭ Zedong estas la programo de tiu ĉi granda revolucio kaj la pensa armilo, kiu garantias, ke tiu ĉi granda revolucio antaŭenmarŝos laŭ la ĝusta vojo kaj gajnos ĝisfundan venkon. Tiu ĉi granda revolucio estas plene fidi kaj sin apogi al la amasoj, ke ili povas eduki kaj liberigi sin mem, kaj aplikas la metodojn de granda demokratio, por solvi paŝon post paŝo la problemon — kiu venkos kiun en la ideologia kampo inter la proletaro kaj burĝaro — elmetitan de kamarado Maŭ Zedong. Centmilionoj da popoloj leviĝis por kritiki la malnovan mondon kaj krei la novan, kaj firme decidis konduki la grandan proletan kulturalan revolucion ĝis la fino. Vi eble ankoraŭ ne komprenas la grandan demokration pledatan de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Tia granda demokratio estas lasi la vastajn amasojn kritiki kaj supervidi la gvidantajn organizaĵojn kaj respondeculojn de diversaj niveloj de la Partio kaj registaro en la formoj de plena eldiro de la opinioj, opiniafiŝoj, grandaj debatoj kaj vastaj interkontaktoj sub la kondiĉo de proleta diktaturo. Estas aplikata la principo "diru ĉion, kion vi scias kaj diru tion senrezerve; kulpigu ne la parolanton, sed estu admonita de liaj vortoj". Tia granda demokratio estas la nova formo de kombino de la penso de Maŭ Zedong kun la vastaj amasoj kaj ankaŭ tiu de sinedukado de la polamasoj. Tia granda demokratio estas nova kontribuo de kamarado Maŭ Zedong al la marksism-leninisma teorio pri proleta revolucio kaj proleta diktaturo.

Ĉe la fino, permesu al ni iom tuŝi la problemon pri ruĝa gvardio, kiu naskiĝis en la granda proleta kultura revolucio kaj ludas en ĝi la rolon de sturmantoj. La ruĝa gvardio estas amasa revolucia organizo de junuloj kaj konsistas ĉefe el gefiloj de laboristoj, malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj, revoluciaj armeanoj, revoluciaj kadroj kaj martiroj, kiel la kerna forto. La plejparto el ili kreskas sub la nutrado de la penso de Maŭ Zedong post la Liberiĝo. Ili plej amas Prezidanton

Maŭ, plej aŭskultas la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj plej volas agi laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ. Ili tutkore servas al la revolucio kaj popolo, sed ne por persona gloro aŭ profito. En kelkaj mallongaj monatoj ili vere skuis la tutan socion kaj la malnovan mondon. Ili forbalais la malnovajn morojn kaj kutimojn de ĉiuj ekspluataj klasoj kiel rubaĵojn. Ĉiuj malnovaj parazitaj kaŝitaj en mallumaj anguloj ne povas eskapi de iliaj akraj okuloj. Tre bonaj estas vere la agoj de la ruĝaj gvardianoj! Iu juna amiko de Senegalio trafe diris, ke la granda proleta kultura revolucio de Ĉinio nepre frakasos la iluzion de imperiismo pri paca evoluo, metitan sur la trian aŭ kvaran generacion de Ĉinio. La fakto ĝuste tiel staras.

La ĉefa revolucia direkto de ruĝaj gvardianoj estas ĉiam ĝusta. Prezidanto Maŭ diris: "La revolucia milito estas afero de la polamasoj; ĝi ofte ne estas farata post ellerno, sed lernata post ekfaro, ĉar faro per si mem ja estas lerno." La junaj ruĝaj gvardianoj sin hardas en la ventegoj kaj ondoj de revoluciaj bataloj. Ili certe povas sin armi per la penso de Maŭ Zedong kaj forĝadi sin en revoluciajn daŭrigantojn de la proleta afero kun alta politika konscio kaj sufiĉa laborkapablo, kaj kun saĝo kaj kuraĝo.

Cejlona kamarado Sanmugathasan trafe diris: "Nun Ĉinio kulturalas la revoluciajn daŭrigantojn. Ĝi instruas la junulojn, por ke ili estu sufiĉe saĝaj por ne forgesi la klasbatalon nek forjeti la gloran revolucionan tradicion kaj por defendi ĝismorte la revolucionan frukton. Ne nur en Ĉinio, sed ankaŭ en la tuta mondo la revolucio devos esti nepre kondukita ĝis la fino. Nun ili alprenas la plej radikalajn paŝojn por preventi la aperon de homoj de Ĥruŝĉov-tipo en Ĉinio." La granda proleta kultura revolucio nun iranta en Ĉinio celas ĝuste tion.

Ni devas ĉesi nun por ne tro longigi tiun ĉi leteron kaj sendas al vian elkoran saluton!

La Red.



人民中國報道

Monata gazeto eldonata de
ĈINA ESPERANTO-LIGO
P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 3 (105) 1967

Ĉefa Enhavo

Rememore al Norman Bethune

Norman Bethune

Vortoj de Kamarado Norman Bethune — Komunisma Batalanto

Rakontoj pri Norman Bethune

Ĉinaj Specialistoj en Malio

Estu Batalantoj Kia Bethune

Ruĝas la Oriento (*kanto*)

Nova Antaŭensalto sur Ĉiuj Frontoj de Nia Nacia Ekonomio

Brila Ekzemplo, Granda Kuraĝigo

Bonega Estas la Ruĝa Gvardio!

Ni Ĝojas pro la Bona Jungeneracio de Nova Ĉinio!

Bravaj Vortoj de Ruĝaj Gvardianoj en Longa Marŝado

Vang Juĉang — Modela Soldat-amanto

Duobla Venko en Revolucio kaj Produkto

Sintezita Kristala Insulino

Granda Disvolviĝo de la Ĉina Foiro de Eksportaj Komercaĵoj

"Ekspozicio de Kontraŭimperiismaj Karikaturaj de Aziaj kaj Afrikaj Popoloj" en Pekino

Kanto pri Oŭjang Haj (*daŭrigo*)

Sur la kovrilo—Nepino Helpas Sian Avinon Studi la Verkon de Prezidanto Maŭ

Sur la dorskovrilo — Akvaj Bambuoj ĉe la Bordo de Ĝi'ou-rivero

Ĉina Kuractrupo en Zanzibaro


Firme tenante en sia memoro la instruon de Prezidanto Maŭ kaj lernante la brilan ekzemplon de kamarado N. Bethune, la ĉina kuractrupo tutkore kaj plenanime servis al la zanzibara popolo. En la pasintaj du jaroj, ĝiaj membroj diligente kaj zorgeme laboris tage kaj nokte spite al varmego, faris pli ol 5,000 operaciojn por zanzibaraj popolanoj, kaj per sia sukcesa malamputo de la derompita mano de zanzibara laboristo Ŝaaban Khamisis kreis alian miraklon en la mondo. La zanzibara popolo estas profunde kortuŝita de la internaciisma spirito de la ĉina kuractrupo kaj unuanime laŭdas kaj dankas "la bonajn kuracistojn alsenditajn de Prezidanto Maŭ".

Ĉinaj kuracistoj faras komplikan kunkudradon de la derompita mano por Ŝaaban.



Sube maldekstre: Ĉina medicina laboranto donas urĝan helpon al la sveninta paciento Ŝaaban, enhospitaligita post derompo de lia mano.

Sube dekstre: Ŝaaban tenas tason per sia resanigita mano.





Akvaj Bambuoj ĉe la Bordo de Ĝi'ouŝ-rivero

La popolo de Kingtian de Ĝegiang-provinco vaste plantas akvajn bambuojn laŭ la bordoj de Ĝi'ouŝ-rivero por protekti la riverbordojn kaj garantii stabilan altan produkton de la kampoj kaj rikoltas ĉiuŝare 1,150 tunojn da akvaj bambuoj.

